

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

8


1996

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Reveno

Foto de QU WEIBO

INTER NI

La rubriko "Laŭ la Silka Vojo", malfermita en la unua numero de nia revuo, 1996, altiris la atenton de niaj legantoj. Nia leganto H.J. Melasniemi el Finnlando skribis al ni: "Ni atendis la unuan numeron de EPĈ pro tio, ke la artikoloj pri la Silka Vojo nin ege interesas. La komenco estis tre bona. Mi prelegos pri Esperanto en du neesperantistaj kluboj... Mi fieras rakonti pri vi kaj via revuo en tiaj rondoj kaj rekomendas ĝin, ke oni povu aboni ĝin kaj studi kaj la lingvon kaj la geografion de sia mondo. La Silka Vojo povus esti 'la fonto de entuziasmo' por studi la internacian lingvon." Iuj legantoj deziras legi pri tiuflankaj raportaĵoj. Ĉi tie ni povus nur koncize diri al ili, ke ni jam sendis trifoje raportistojn fari viziton laŭ la Silka Vojo. Ilia itinero komenciĝas de Xi'an, Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco, deirpunkto de la Silka Vojo, kaj finiĝas per Ejne-gubernio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Laŭ la vojo estas prosperaj urboj, kiaj Tianshui, Lanzhou (Lan-

goŭ), Wuwei, Zhangye (Ĝangje) kaj Jiuquan (Ĝiŭ-ĉjŭan) de Gansu-provinco, kaj ankaŭ dezertaj lokoj. Tiuj raportaĵoj aperis kaj aperos en ĉi-jaraj numeroj kaj la unuaj numeroj de 1997. La resta parto de la vojaĝo interne de la lando estos malfacila, precipe la suda kaj norda partoj de la Xinjiang (Ŝingĵang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, vastaj kaj trafike maloportunaj, malfaciligas nian viziton. Tamen ni faros ĉion eblan por kontentigi la deziron de niaj legantoj.

Pola leganto Jerzy Dembicki skribis al ni: "Ŝajne ĉiu lingvo havas kuriozaĵojn. Eble ankaŭ la ĉina. Ĉu vi povus skribi pri ili?" Jes. La ideogramoj de la ĉina lingvo havas multe da kuriozaĵoj. Pro tio s-ro Zhang Qicheng (Ĝang Ĉjiĉeng) kontribuis per tri artikoloj. La artikoloj "Ĉu la ĉina lingvo malfacila?" (en du partoj) kaj "Idiomoj en la ĉina lingvo" jam estis publikigitaj en la n-roj 7-8, 1995 kaj n-ro 3, 1996. Lia tria artikolo "Fremdaj influoj en la ĉina lingvo", kiu aperos en la n-ro 9, 1996, temas pri alia rimarkinda karakterizaĵo de la ĉina lingvo en ĝia evoluo.


La Red.

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 *TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:*
Pri la origino de la Hongkong-a problemo
- 6 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
Respektinda Li Naixi
- 10 Karmemore al Veselin Damjanov,
kantisto en Esperantujo
- 11 *POR KOMENCANTOJ:*
Zorgema filo; Abeloj kaj muŝo
- 12 *ORIGINALE VERKITAJ:*
Malfrua feliĉo (Novelo)
- 15 *ESP-NOVAĴOJ*
- 16 Interesplena Nanwan-lago
- 17 Longa vojo por la ĉina kosmonaŭtika afero
- 20 Daŭre lernu malriĉaj urbaj geknaboj
- 22 En la kamparo de Haimen
- 24 Spuroj de malaperinta tribo
- 25 *NUNTEMPA BELARTO:*
Elvokivaj pentraĵoj pri neĝkovrita lando
- 28 *LAŬ LA SILKA VOJO:*
La grava urbo Lanzhou
- 35 Akva urbo sur altebenaĵo
- 36 *MULTNACIA ĈINIO:*
Poŝto kaj telekomuniko en la nacimalplimultaj regionoj
- 38 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*
La Publika Lego-Asocio de Pekino
- 40 Fotografio en la Imperiestra Palaco
- 42 *POR VIA SANO:*
Gimnastiko por la gastroentera funkcio
- 43 Por la sano de naskipovaj virinoj
- 44 *SUR NIA LIBROBRETO:*
Pompo el la ĉina kulturo
- 46 *KURANTAJ AFEROJ*
- 48 Nestoj de birdoj
- 49 La higiena urbo Haimen
- 50 *GALERIO:*
Aglo sur cipreso
SUR LA KOVRILO:
Plektistino Foto de **Sui Fengmao**
- 2 Reveno
SUR LA DORSKOVRILO:
Pagodo ĉe lago

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio (p. 36)
2. Haimen (p. 50)
3. Dayan (p. 35)
4. Tibeto (p. 25)
5. Yinan-gubernio (p. 43)
6. Xinyang (p. 16)





Parto de Hongkong

TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ

Pri la origino de la Hongkong-a problemo

de DONG ZHU

Lastatempe iuj legantoj letere demandis al ni, kiel originis la problemo pri restarigo de la suvereneco de Ĉinio super Hongkong en la 1-a de julio 1997. Nia rusa leganto Nikolao Neeajev proponis, ke ni detale konigu la urbon Hongkong. Nia revuo iam publikigis artikolojn pri la Hongkong-a problemo. Petate de niaj legantoj, ni aperigos ekde ĉi tiu numero artikolojn pri la origino de la Hongkong-a problemo, la urbo Hongkong, restarigo de la suvereneco de Ĉinio super ĝi k.a.

La Red.

HONGKONG estas teritorio de Ĉinio. Kial Ĉinio restarigos sian suverenecon super ĝi en la 1-a de julio 1997? Por klarigi tiun ĉi

problemon, estas necese komenci mian artikolon per la du Opiaj Militoj okazintaj antaŭ pli ol 100 jaroj.

En la 19-a jc Ĉinio estis mistera lando en la okuloj de nemal-

multaj okcidentanoj. La antikva historio, delikataj silkaĵoj, porcelanaĵoj kaj teo, abundaj naturaj riĉfontoj faris Ĉinion alloga por multaj okcidentaj potencoj.

En 1793 kaj 1816 Britio dufoje

sendis diplomatojn al Ĉinio por intertraktado kun la registaro de Qing-dinastio (1644-1911). Britio volis negoci kun Ĉinio, oferti siajn varojn kaj forpreni ĉinajn malkarajn industriajn krudmaterialojn. En la tiama Ĉinio la aŭtarkia ekonomio, kombinanta la feŭdan agrikulturan ekonomion kun la familia metio, okupis regpozicion en la socia ekonomio, t.e. viroj terkulturis kaj virinoj teksis, ili vivis memsufiĉan vivon. Kaj la registaro de Qing-dinastio arogante rigardis sin la plej aŭtoritata sub la ĉielo kaj praktikis pordferman politikon. Tial, ne estis senkaŭze, ke ĝi rifuzis la postulon de la brita registaro.

Malsukcesinte malfermi la pordon de Ĉinio, la brita registaro ŝtele transportis grandan kvanton da opio al Ĉinio. En la komenco de la 19-a jc Britio ĉiujare ŝtele transportis 4 000 kestojn da opio al Ĉinio kaj en 1838-1839 35 000 kestojn. En la 20 jaroj antaŭ 1840 cent milionoj da taeloj da arĝento de Ĉinio estis forportitaj alilanden.

Pli serioza sekvo estis, ke pro opi-fumado de gravaj registaraj oficistoj putriĝis la politiko de Ĉinio. Opi-fumado de soldatoj kolapsigis batalforton de la ĉina armeo. La rezulto estis evidenta.

Sub tiu cirkonstanco iuj patriotaj ŝtatoficistoj petis la kortegon kategorie malpermesi opi-fumadon. Fronte al la afero koncernanta la ŝtatan sorton, la imperiestro akceptis ilian proponon kaj nomumis Lin Zexu (Lin Zeŝju) (1785-1850) revizoro al Kantono por malpermesi opion. De la 3-a ĝis la 25-a de junio 1839 sur la plaĝo de Humen ekster Kantono leviĝis densa fumo. Laŭ la ordono de Lin Zexu oni forbruligis antaŭ la publiko 1.15 milionojn da kg da opio, konfiskitajn al britaj, usonaj kaj alilandaj opikomercistoj. Tio tre ĝojigis la ĉinan popolon.

Informiĝinte pri tio la britaj agresantoj ekspedis militŝipojn al

la maro ĉe Guangdong kaj blokis la enmariĝon de Perlo-rivero. Tiel komenciĝis la Opia Milito (1840-1842), fama en la historio.

Antaŭ la ŝipoj kaj kanonoj de Britio la dekadenca registaro de Qing-dinastio kompromisis kaj subskribis kun Britio serion da naciperfidaj traktatoj. En 1842 Britio devigis la registaron de Qing-dinastio subskribi la "Nankina Traktato", kiu koncesiis Hongkong-insulon al Britio. En 1860 la registaro de Qing-dinastio devigite subskribis la "Pekina Traktato" kaj koncesiis al Britio la regionon sude de Jiexian(-Ĝješjan)-strato en la suda parto de Jiulong-duoninsulo. Post la Ĉina-Japana Milito en 1895, kiam multaj potencaj landoj dividis Ĉinion, Britio devigis la registaron de Qing-dinastio subskribi la "Traktato por Plivastigi la Koncesiitan Hongkong" en 1898, kiu koncesiis al Britio vastan areon norde de Jiexian-strato kaj sude de Shenzhen-rivero la nordan parton de Jiulong-duoninsulo kaj pli ol 200 proksimajn insuletojn. La koncesiiteco daŭros ĝis la 30-a de junio 1997.

Hongkong, oriente de la enmariĝo de Perlo-rivero en Guangdong-provinco, konsistas el Hongkong-insulo, Jiulong-duoninsulo kaj Xinjie. Ĝi areo entute 1 067 kvadratajn kilometrojn. Ĝi estis sub Xin'an-gubernio (alinomita Bao'an, poste Shenzhen). Ĝi estas neapartigebla parto de la ĉina teritorio jam de antikve kaj grava pordo de Ĉinio al la mondo. La bela teritorio estis devigite koncesiita, samkiel infano forrabita el la sino de sia patrino, kio ekstreme dolorigis la ĉinan popolon. Por repreni ĝin, la ĉina popolo faris neflekseblan batalon kontraŭ la fremdaj agresantoj.

La Hongkong-a problemo esence estis kaŭzita de la senĉesa agresado de Britio al Ĉinio en la 19-a jc. La tri traktatoj "Nankina Traktato", "Pekina Traktato" kaj

"Traktato por Plivastigi la Koncesiitan Hongkong" estis kaŭzitaj de alilanda milita agresio. Post la Revolucio de 1911, okazinta en la 10-a de oktobro kaj gvidata de la ĉina burĝaro, neniuj ĉina registaro agnoskis ilin.

Post fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 la ĉina registaro alprenis politikon portempe ne ŝanĝi la staton de Hongkong por teni ĝian prosperon kaj stabilecon. Tio ne signifas, ke Ĉinio preteratentis, ke Hongkong estas ĝia sankta teritorio. Ĉinio multfoje deklaris sian starpunkton pri la Hongkong-a problemo: Hongkong estas ĉina teritorio. Ĉinio ne agnoskas ĉiujn neegalajn traktatojn devigitajn de la okcidentaj potencaj landoj al Ĉinio kaj restarigos sian suverenecon super Hongkong en la konvena tempo, per konvena metodo.

La 10-an de marto 1972 konforme tion, ke iuj okcidentaj landoj trumpetis pri internacieciĝo de Hongkong-a problemo, kiu estos solvita de UN, la ĉina konstanta reprezentanto en UN refoje detale prezentis la sintenon de la ĉina registaro: "Hongkong kaj Aomen, kiel parto de la ĉina teritorio, estas okupitaj respektive de Britio kaj Portugalio. Solvi la problemon de Hongkong kaj Aomen estas problemo kadre de la ĉina suvereneco, kaj estas tute malsame kiel la tiel nomata kolonia sfero. Tial, ili ne devas enskribiĝi en la liston de kolonioj en la kontraŭkoloniisma deklaro." La 15-an de junio la Speciala Komitato pri Senkoloniigo de UN aprobis la rezolucion kaj proponis al la Ĝenerala Asembleo de UN forstreki el la listo Hongkong kaj Aomen. La 18-an de novembro la rezolucio de la 27-a Ĝenerala Asembleo de UN sankciis la proponon.

En 1972 Britio kaj Ĉinio oficiale starigis diplomatajn rilatojn, kio donis ŝancon por solvi la Hongkong-an problemon per paca intertraktado de la du landoj. ■

Respektinda Li Naixi

Teksto de WANG HANPING
Fotoj de LI CHUNGENG



S-ro Li Naixi

DUM siaj ĝisnunaj travivaĵoj de 88 jaroj li estis esperantisto 70 jarojn, kies trionon li dediĉis al profesia Esperanto-laboro. Li estas s-ro Li Naixi (Li Najŝji). Liaj travivaĵoj ne estas unikaj en Esperantujo, tamen lia diligenteco kaj kontribuo al la ĉina E-movado meritas nian respekton.

En 1908 s-ro Li Naixi naskiĝis en Meixian (Mejŝjan)-gubernio de Guangdong-provinco. De infanaĝo suferante molestadon de alilandaj agresantoj kaj batalojn inter enlandaj militaristoj, li elkore sopiris al paca kaj ideala socio. Jam en mezlernejo li legis multe da progresemaj libroj, inter kiuj estis gazeto "Studentoj" kun Esperanta rubriko gvidata de Hujucz, estro de la Ŝanhaja E-Asocio. Ĉe la unua renkontiĝo kun Esperanto, li firmigis sian decidon lerni ĝin.

Printempe de 1928, s-ro Li Naixi sukcese trapasis la ekzamenon eniri armean lernejon de Nankino por studi radion. Tiam li aĉetis Esperantan lernolibron kaj komencis

memlernadon. En 1929 kune kun aliaj progresemuloj li estis ĵetita en malliberejon. En ĝi li informiĝis, ke la Ŝanhaja E-Asocio starigis korespondan E-lernejon. Petite de li, iu lia libera kunlernanto sendis por li la lernopagon. Tiam la famaj e-istoj Hujucz kaj Bakin donis lecionojn kumule en tiu lernejo. Ili persone korektis liajn ekzercojn. Ĉiutage en la malliberejo, krom manĝi, dormi kaj promeni, li ankaŭ havis sufiĉe da tempo por lerni. Tial li plenumis la lernadon en duonjaro. Poste li aĉetis kelkajn E-librojn por plua studo.

Unu jaron poste, li estis liberigita. Unue li partoprenis la kontraŭjapanan batalon en Ŝanhajo kaj poste venis al Fujian (Fuĝjan)-provinco. Tiam viglis E-movado en kaj eksterlanda. Li abonis nombron da E-gazetoj kaj aliĝis al UEA. En Guiyang, ĉefurbo de Guizhou (Gujĝoŭ)-provinco, li luis klasĉambro de iu elementa lernejo kaj starigis E-kurson en la someraj ferioj. Poste veninte en Chongqing (Ĉongĉing) de Sichuan-provinco, li daŭrigis lernadon de Esperanto kaj elesperantigis kaj publikigis versa-

ĵojn kaj mallongan romanon "La Teatra Korbo" de Julio Baghy.

En 1937 eksplodis en la tuta lando la Kontraŭjapana Rezistmilito. La vivo de s-ro Li Naixi fariĝis pli malkvieta. Li loĝis sinsekve en Xi'an (Sji'an), Chongqing, Hongkong kaj aliaj lokoj. Ĉiam akompanis lin Esperantaj libroj. Ĉiufoje, kiam li atingis iun lokon, li klopodis kontaktiĝi kun ĝiaj esperantistoj. Dume li konatiĝis kun Venlo Fon, Eltunko, Zhang Qicheng (Ĝang Ĉjiĉeng) kaj aliaj ĉinaj esperantistoj. Foje li kaj Venlo Fon fondis Esperantan presejon, kiu finfine bankrotis pro malbona mastrumado.

Antaŭvespere de la fondiĝo de la popola respubliko, li venis en Pekinon. Post nelonge li ĝojis pri la apero de la unua numero de EPC (1950), ĉeestis la fondkunvenon de la Ĉina Esperanto-Ligo (1951) kaj donis kontribuojn al la revuo. Poste li estis sendita al la Ĉina-Pollanda Mar-transporta Kompanio. Dum tiuj jaroj li ne okupiĝis pri E-movado.

En 1958, post la reveno al sia

patrolando s-ro Li Naixi funkciis kiel ĝenerala direktoro de ĈEL kaj respondecis pri redaktado, eldonado kaj distribuado de EPC. En la sama jaro li estis elektita kiel konstanta komitatano de ĈEL. Dum sia servoperiodo li iom post iom plimultigis profesiajn esperantistojn de la redakcio de EPC, kreskigis kolorajn kaj blanka-nigrajn bildojn de la gazeto kaj pliriĉigis ĝian enhavon. Tiel rimarkinde multiĝis la abonantoj.

Samtempe, por plivastigi Esperanton kaj por konigi Ĉinion per Esperanto al pli multaj esperantistoj de aliaj landoj, precipe de Sovetunio kaj aliaj orient-eŭropaj landoj, s-ro Li Naixi proponis funkciigi Esperantan disaŭdigon en Radio Pekino (nun Ĉina Radio Internacia). Lia propono estis aprobita de Hujuc, Jezezo kaj Chen Yuan, estraranoj de ĈEL. Dank' al ilia klopodo la Esperanta elsendo ekfunkciis fine de 1964.

Por gajni pli da simpatiantoj, oni devas konigi Esperanton al pli multaj homoj. S-ro Li Naixi alifoje proponis al ĈEL okazigi ekspozicion pri E-laboro. La ekspozicio sukcese okazis julie de 1963 en Pekino. Ĝin ĉeestis vicĉefministro Chen Yi kaj aliaj ŝtataj gvidantoj. Dum la ekspozicio okazis ankaŭ la 1-a Tutlanda Laborkunsido de Esperanto, en kiu Chen Yi faris paroladon por montri sian subtenon al Esperanto. Tio multe kuragiĝis la ĉinajn esperantistojn.

Laŭ opinio de Chen Yi, s-ro Li Naixi tuj post la kunsido donis grandan atenton al kulturado de junaj esperantistoj. Interkonsiliginte kun la Ŝtata Ministerio de Supera Eduko, ĈEL starigis kurson por altlernejaj E-instruistoj. La ministerio ankaŭ publikigis oficialan dokumenton, ke la altlernejoj uzu Esperanton kiel duan fremdan lingvon en la fremdlingva fakultato kaj kiel nedevigan studobjekton en aliaj fakultatoj. Fininte la lernadon en la nomita kurso, la instruistoj starigis nedevigan E-kurson en dek ĉinaj altlernejoj. En 1964 ĈEL starigis E-kurson ankaŭ en la Pekina Radio-disaŭdiga Instituto. La kursoj venis el diversaj altlernejoj.

Post unujara lernado ili estis senditaj al la redakcio de EPC, Radio Pekino ktp. Tiuj esperantistoj edukitaj en la 60-aj jaroj fariĝis aktivuloj de la ĉina E-movado. Ankaŭ ili elbakis multe da esperantistoj.

S-ro Li Naixi ne nur kontribuis por la redaktado kaj eldonado de EPC, por la Esperanta disaŭdigo kaj por la edukado de esperantistoj, sed ankaŭ gvidis ĈEL en tradukado kaj publikigo de pli ol cent E-libroj sub la helpo de en- kaj eksterlandaj samideanoj.

En la sekvantaj dek jaroj de la kultura revolucio la ĉina E-movado estis serioze atakita. S-ro Li Naixi devigite forlasis sian postenon. Ĝis 1979 la pli-ol-60-jara Li Naixi revenis al ĈEL kaj ekfunkciis kiel ĝia vicĝenerala sekretario. En la sama jaro okazis la 2-a Tutlanda Laborkunsido de Esperanto. La ĉina E-movado revigliĝis kaj senprecedence prosperis meze de la 80-aj jaroj.

Por gvidi E-movadon en diversaj lokoj de la lando kaj helpi esperantistojn en E-lernado, s-ro Li Naixi proponis fondi revuon por ĉinaj esperantistoj, t.e. la organon de ĈEL "La Mondo", kiu aperis en 1981, kun li kiel ĉefredaktoro. Por la fondiĝo de la societo "Amikoj de Esperanto", la Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj la libro-servo de EPC, li faris multajn laborojn.

Krome s-ro Li Naixi persistis en

tradukado. Ekde 1980 li elesperantigis "La Lanternisto kaj Aliaj Noveloj", "Maŝin-mondo", "Dio Rekompencu Vin", "Versaĵoj en Prozo" (de Turgenev) ktp. kaj faris piednotojn por multaj E-verkaĵoj. La de li ĉinigita "Taglibro de Anne Frank" popece publikigis en "La Mondo" kaj ricevis laŭdon pro sia bela lingvaĵo. Li elesperantigis ankaŭ multe da fremdlandaj literaturajoj, verkis kaj publikigis en "La Mondo" multajn artikolojn pri Esperanto.

Li donis grandan atenton ankaŭ al edukado de Esperantaj instruistoj. Dank'al lia klopodo en 1981 starigis landskala kurso por altlernejaj E-instruistoj. Ĝis 1988 funkciis entute 8 tiaj kursoj kaj en ili flernis pli ol 200 instruistoj. S-ro Li Naixi ankaŭ partoprenis ellaboradon de la E-instrua programo por altlernejoj kaj kompiladon de "Lernolibro de Esperanto". Li ankaŭ faris preparajn laborojn por la 1-a Ĉina Kongreso de Esperanto en Kunming kaj la 71-a UK en Pekino. En 1987 li emeritiĝis.

Malgraŭ la neglata vivovojo s-ro Li Naixi estas ĉiam sindediĉa al Esperanto. Nun pro maljuneco kaj malforteco li ne tiel aktivis en la ĉina E-movado kiel antaŭe. Tamen, kiam li aperis en la memorkunsido okaze de la 45-jariĝo de ĈEL, la ĉeestantoj estis ege kortuŝitaj. ■

S-ro Li Naixi kaj korea samideano (maldekstre)





S-ro Li Naixi (dekstre) en diskutado pri E-instrua programo



S-ro Li Naixi (dekstre) kaj japana samideano en 1984

S-ro Li Naixi (maldekstre) emeritiĝinta





S-ro Li Naixi kaj liaj familianoj

S-ro Li Naixi (la dua de maldekstre) kaj danlandaj samideanoj en 1964



WANG YUQIN:

Karmemore al Veselin Damjanov, kantisto en Esperantujo

EN 1986 forpasis s-ro Veselin Damjanov, fama kantisto en nia Esperantujo. Ĉe la 10-a datreveno de lia forpaso mi rememoris mian intervjuon kun li okaze de la 68-a UK en Budapeŝto, en 1983. Kiel raportistino de la Esperanta sekcio de Radio Pekino (nun Ĉina Radio Internacia), mi partoprenis la kongreson kaj intervjuis s-ron Veselin Damjanov tuj post la internacia vespero, en kiu li belege kantis.

Por rememorigi pri li, mi publikigas jene mian surbendigitan intervjuon kun li.

Wang: S-ro Damjanov, antaŭ ĉio mi gratulas vin pro via brila kantado ĉi-vespere. Tiel longa kaj varma aplaŭdado, tiel emociaj huraoj! Jen via sukceso!


Damjanov: Dankon! Koran dankon!

Wang: La 71-a UK eble okazos en Pekino. Mi esperas, ke vi kantos ankaŭ en Pekino tiam. Vi certe ricevos varman akcepton.

Damjanov: Ho, mi ne dubas pri tio. Fakte antaŭ 27 jaroj, mi turneis en Ĉinio ses monatojn, en Ŝanhajo, Pekino, Nankino, Kantono kaj aliaj lokoj. Mi kantis eĉ en la ĉina lingvo. Mi havis grandan sukceson tiam. La turneo estis belega kaj neforgesebla por mi. Mi pensas, ke se mi estos viva kaj sana, mi volonte partoprenos en tiu kongreso kaj kantos en Ĉinio.

Wang: Ĉinaj esperantistoj estos ravitaj.

S-ro Damjanov kaj la aŭtoro en 1983



Damjanov: Mi informiĝis, ke lastatempe la movado en Ĉinio kreskis, eĉ kreskegis, ĉu vere? Ĉu estas multaj ĉinoj, kiuj lernas Esperanton? Ĉu tio estas vera?

Wang: Jes, tute vere! En diversaj lokoj de Ĉinio jam fondiĝis provincnivela kaj urbonivela Esperanto-Asocioj, ĉie funkcias kursoj, konversaciaj, ekspresaj kaj progresigaj.

Damjanov: Ĉu multaj junuloj?

Wang: Jes, multaj junuloj, eĉ infanoj.

Damjanov: Tre bone!

Wang: Antaŭ nelonge mi legis iun hispanan Esperanto-revuon, kies titolon mi forgesis...

Damjanov: Aha, -estas bulteno...

Wang: Jes! En tiu bulteno oni skribis, ke vi faris recitalon kaj ricevis varman akcepton.

Damjanov: Jes, certe. Krom tio oni aranĝis ankaŭ multajn intervjuojn ĉe la lokaj radiostacioj. Estas interese, kiamaniere ni propagandu Esperanton, ĉar miloj da homoj atendas paroli pri Esperanto.

Wang: La ĉi-foja kongreso invitis vin, ĉu ne?

Damjanov: Jes. Oni invitis min per letero. Mi jam sinsekve partoprenis en UK ok jarojn. Do mi estas tre konata en Esperantujo.

Wang: Bovolus paroli, kiamaniere vi esperantistiĝis.

Damjanov: Kiam mi estis 9-jara infano, en nia urbeto oni organizis E-kurson, mi vizitis ĝin unu monaton. Antaŭ 9 jaroj iu esperantisto, gvidanto de nia Esperanto-teatro, invitis min partopreni en la kongreso en Hamburgo. Li diris al mi, ke mi devas prepari du erojn en Esperanto. Tiam mi ne komprenis nek parolis Esperanton, kaj li donis al mi Esperanto-libron. Mi eklernis kaj konstatis, ke tiu lingvo estas ege facila. Poste mi partoprenis en la kongreso en Hamburgo. Tiam mi estis ravita de la frateca etoso de Esperantujo. Post mia reveno al Sofio mi komencis lerni diligente kaj komencis vastan korespondadon kun multaj esperantistoj de la mondo. Iom post iom mi perfektigis en la studado de la lingvo. Mi povas rekoni kaj fine aldoni, ke Esperanto vere estas mia dua vivo.

Lastatempe mi ofte turneis en Eŭropo, celante propagandi nian lingvon. Mi kantis en sep lingvoj, inkluzive Esperanton, por ke la neesperantista publiko havu la eblecon kompari Esperanton kun aliaj lingvoj kaj konvinkiĝu, ke la internacia lingvo Esperanto estas belsona kiel naciaj lingvoj.

Wang: Se mi aŭdacus, en la nomo de niaj aŭskultantoj, peti vin nun kanti unu kanton plej ŝatatan de vi mem, ĉu vi konsentas?

Damjanov: Sed, sen akompanado, estas malfacile...

Wang: Nur mallaŭte kantu speciale al niaj aŭskultantoj en diversaj landoj. Kiam ili aŭdos vian voĉon tra radio-ondoj, ili certe tre ĝojos.

Damjanov: Do, bone!

Wang: Ĉu vi havas mesaĝon al niaj aŭskultantoj?

Damjanov: Mesaĝon? Mi esprimas mian mesaĝon per mia propra komponaĵo: "Sub Nia Verda Stelo Brilanta".

Wang: Dankon! Bonvolu!

(*Damjanov Kantis senakompane antaŭ la mikrofono.*)

Zorgema filo

(Infanrakonto)

de LARISA KUZMENKO (Rusio)

MI sidis sur la bordo de la vilaĝa rivero kaj rigardis la akvon. Subite mian atenton altiris du nigraj punktoj ekaperintaj sur la akvosurfaco. Ĉu tio estas lignaĉaĵo kun du rompitaj branĉoj? Ne. Zizeloj? Ĝuste, zizeloj! Ili alproksimiĝis tiel, ke nun mi povis klare vidi ilin. Ili naĝis, elmetinte super la akvon sian kapeton, kaj tenis sin je bastoneto per siaj dentoj. Ŝajnis, ke la bastoneto malfaciligis ilian naĝadon, sed ili daŭre obstine kroĉiĝis al ĝi. La fluo flankenigis ilin, tamen ili daŭre penege naĝis kontraŭ ĝi, energie laborante per siaj malgrandaj piedoj.

Finfine la akva bariero estis venkita. La bestoj eliris sur sablon, forskuis akverojn de sur sia haŭto. Poste unu zizelo komencis flegi la alian, elpremante akverojn sur ĝia haŭto per siaj piedoj. Mirinda faro!

Neatendite iu viro aperis apud mi. Li portis kaskedon kaj altajn botojn kaj aspektis kiel traktoristo aŭ mekanikisto. Forlogita de la zizeloj, mi eĉ ne aŭdis, ke li aliris.

“Ĉu vi vidas? Rigardu! Ankaŭ mi observis ilin,” li diris duonvoĉe por ne fortimigi la bestojn.

“Kuriozaĵo!”

“Do, ili ĉi tie jam multfoje estas. Kaj komence mi eĉ ne povis kompreni la okazaĵon.”

“Pri kio?”



“La zizelino estas blinda. Ŝi estas patrino. Kaj la alia zizelo estas ŝia filo. Ŝi vidas nenion kaj eble ne povas aŭdi. Kaj li zorgas pri ŝi. Sur la alia bordo mankas nutraĵo, ĉar okazis incendio, kaj ili transnaĝas la bordon por akiri nutraĵon ĉi tie. Ilia loĝejo estas tie, la manĝaĵo — ĉi tie. La filo donas al panjo bastoneton, por ke ŝi ne perdiĝu dum naĝado. Ege zorgema filo!”

Mi longe sidis sur la bordo, dezirante denove ekvidi la paron, sed la bestoj jam fornaĝis. ■



Abeloj kaj muŝo

(Infanrakonto)

de LARISA KUZMENKO (Rusio)

ESTIS hela malfruaŭtuna tago. La grizaj nuboj dispeliĝis, la vento kvietiĝis, ekaperis la suno kaj rigardis tiel karese, kvazaŭ adiaŭante la velkajn herbojn. La vilaj abeloj, vokitaj el siaj abelujoj per lumo kaj varmo, gaje zumadis, transflugadis de unu herbeto al alia, ne por mielon kolekti, sed simple por sin distri kaj etendi siajn malgrandajn flugilojn.

“Kiel stultaj vi estas kun via zumado kaj ĝojo!” iu muŝo ekkriis al ili. Ĝi jam sidis sur la herbejo kaj estis malgaja, eĉ mallevis sian nazon. “Ĉu vi ne scias, ke la suneto nur por unu minuto elrigardis kaj eble jam vespere ekventos, ekpluvos kaj malvarmiĝos, tiam estos la fino al vi ĉiuj.”

“Zum-zum-zum! Pro kio ni pereu?” respondis la gajaj abeloj al la muŝo. “Ni ĝojas, dum la suno brilas, sed kiam malbona vetero alvenos, ni kaŝos nin en nia varma abelujo, kie jam multe da mielo estas rezervita de ni dum somero.” ■

Malfrua feliĉo

(Novelo)

de LIU CAISHENG*



La aŭtoro

TAGIGIS. Horloĝo batis la sesan. Jado ankoraŭ ne vekigis. Knaris malnova lito en la najbara ĉambro. Ellitigis ŝia 80-jara patrino. Ŝi malrapide vestis sin kaj senbrue glitis en la ĉambron de sia filino Jado. Rigardante zorgeme sian 50-jaran filinon, ŝi mallaŭte vokis: "Jado, Jado! Jam tagigis. Estas tempo por ellitigi."

Kutime la bonkora maljunulino neniel vokis sian filinon, kompatindan, malfeliĉan, sed hodiaŭ ŝia mezaĝa filino devas refoje edzinigi. Je la 9-a la novedzo venos ĉi tien por forveturigi ŝian filinon. Do ŝi devis vekigi la filinon el la dormo.

Jado iom movis sin kaj post kelkaj sekundoj malfermis siajn okulojn. Hieraŭ ŝi ne dormis la tutan nokton. Sapiro al la estonta feliĉo, maltrankvilo pri la ebla konflikto kun la duongefiloj kaj karmemoro pri la mortinta edzo alterne tumultis en ŝia pensado. Vidinte sian patrinon apudsidantan, ŝi tuj sidigis: "Bonan matenon, panjo!"

"Ĉu Ren'er kaj lia edzino venos hodiaŭ?" demandis la maljunulino.

"Mi ne scias, sed kredas, ke ili ne venos," respondis Jado kun amara rideto.

Ren'er estas filo de Jado. Li ed-

zigis antaŭ 3 jaroj. Nun li loĝas en alia loko je 2 km for de sia patrino.

Jado ellitigis. La grizhara 80-jarulino helpis ŝin ordigi sin. Antaŭe, kiam Jado estis knabino, ŝia familio estis tiel malriĉa, ke iam la tuta familio ne havis eĉ unu groŝon por manĝaĵo kaj vesto. Ŝi estis maldika, kun du dikaj nigraj harplektaĵoj. Sur ŝia delikata vizaĝo brilis paro da dolĉaj kaj saĝaj okuloj. Ŝia patro mortis, kiam ŝi aĝis nur 10 jarojn.

Jado kaj ŝia patrino baraktis en mizero. Ŝi eklaboris en tekstila fabriko en la aĝo de 13 jaroj. Ŝia patrino kudris kaj lavis vestojn por riĉuloj. Malgraŭ ilia pena laboro, malriĉeco multe turmentis ilin. Tristo ofte rongis la koron de tiu svelta kaj laborema knabino. Pluraj junuloj svatis sin al ŝi. Kaj plaĉis al ŝi iu juna laboristo, tamen ŝi diris tion al neniu. Ŝi ŝlisis tiun sekreton en la koro. La junulo ofte akompanis ŝin reveni hejmen, post kiam ŝi finis noktoskipan laboron, kaj donis al ŝi monon, kiam li trovis, ke ŝi manĝis nenion en la tagmanga horo. La monon ŝi akceptis, sed post nelonge ŝi malŝuldigis sin tuj, kiam ŝi ricevis salajron. En kunesto kun la junulo, Jado ĉiam sentis sin ĝoja, sed malfeliĉo ĉiam akompanis nian mizeran heroinon. La junulo devis

foriri al sia hejmloko 1 000 km fore pro la morto de sia patro. Li disigis de Jado en malĝojo. Ĉe la adiaŭo Jado promesis al sia amato, ke ŝi atentos ĝis lia reveno. Sed la junulo foriris por eterne. Post funebraj aferoj survoje al sia laborloko la junulo malsaniĝis kaj estis prirabita je ĉiuj siaj havaĵoj. En la batalo kontraŭ la rabistoj li estis mortigita. La malfeliĉa informo venis kvazaŭ tondro falanta sur ŝian kapon. Ŝi ne povis elteni tiun korŝiran baton kaj grave malsaniĝis. Ŝi diris al sia patrino, ke ŝi neniam edzinigos kaj akompanos ŝin la tutan vivon.

La tempo forpasis malrapide. La mizera vivo estis longe trenata, tamen ĝi venis al sia fino. Liberigis la tuta lando kaj la popolo fariĝis mastro de sia propra sorto. En la persona vivo de Jado denove ekbrilis fajro de amo. Oni svatis ŝin al iu mezstatura, fortmuskola laboristo, kiu estis pli aĝa ol ŝi je 3 jaroj. Ili interkonatiĝis kaj post kelkaj monatoj geedzigis. Oni povas diri, ke ilia postgeedziga vivo estas feliĉa. La juna paro vivis kune kun la patrino. Unu jaron post sia edziniĝo Jado gravedigis kaj naskis amindan infanon, brunetan kaj diketan. Tio estas Ren'er.

Kiu scias, pro kio la sorto ĉiam malice ŝercis kun Jado? Kiam ŝia

fileto estis 3-jara, trafika akcidento trafis ŝian edzon kaj li mortis en hospitalo, kvankam oni faris ĉion eblan por savi lin. Jado vidviniĝis kaj ŝia filo orfiĝis.

Eltenante grandegan spiritan baton, Jado penege laboris en fabriko kaj flegis sian filon en la hejmo. Dank' al sia oferema laborado ŝi plurfoje estis elektita kiel labormodelo de la distrikto kaj urbo. Parolante el pura konscienco, ŝi, ŝia patrino kaj ŝia filo vivis feliĉe. Kvankam la enspezo ne estis granda, tamen por vivtenado ĝi sufiĉis. En la laborado, en sia propra hejmo kaj precipe en sia filo ŝi vidis perspektivon.

Jen tiel pasis tagoj, monatoj kaj jaroj. Ŝia Ren'er kreskis, eklernis en elementa lernejo, gimnazio... dume ŝi eniris en sian mezaĝon. Sur ŝia vizaĝo antaŭe rozeta aperis delikataj sulkoj.

Ren'er fariĝis mezstatura, forta viro kiel arbotrunko. Fininte la gimnazian studon, li komencis ofician vivon en iu kompanio.

Nelonge post sia eklaboro li konatiĝis kun laboristino Krizantemo malpli aĝa ol li je 2 jaroj. Ili enamiĝis unu al la alia kaj post duonjaro geedziĝis sen aprobo de Jado.

Koncerne Jadon, oni ne sciis, ĉu ŝi ŝatis aŭ malŝatis la bofilinon. Ĝenerale dirite, ŝi ne bone konis la bofilinon. Tamen pro la tenera patrinceco ŝi ameme traktis Krizantemon.

En la komenco Jado, ŝia patrino, Ren'er kaj Krizantemo vivis kune kaj oni povis diri, ke la vivo estis harmonia. Tiam la juna paro ne havis sian propran neston.

Foje, malsaniĝis la avino de Ren'er. La maljunulino kuŝis en la lito pro febro. Jado sin okupis je dekokto de drogherboj por sia patrino kaj ne havis tempon prepari vespermanĝon. Venis Ren'er post laboro. Li salutis sian avinon kaj ekfumis ĉe la lito-rando de la malsanulino. Post kelkaj minutoj revenis hejmen Krizantemo.

"Ah, mi estas morte malsata, kial vi ne preparas vespermanĝon?" ŝajne ŝi demandis sian edzon, sed fakte montris malkontenton al la

bopatrino kaj avino.

"Hm, mi ne kapablas fari tion, kaj panjo estas okupita. Ĉu vi ne vidas, ke la avino febras? Pli bone vi preparu la vespermanĝon!" diris Ren'er al sia edzino.

"Vi vane vivis tiujn jarojn! Nenion farante tuttage en la hejmo nek preparante manĝaĵojn, ĉu vi ne hontas?" kriis Krizantemo.

"Diru klare, Krizantemo! Kiu faras nenion tuttage hejme?" La avino ne povis sin deteni kaj demandis. Ŝi estis febra, tamen sobra.

Sekve de tio la juna paro ekkverelis furioze. Bolante de kolero, Ren'er vangfrapis la edzinon. La pikema Krizantemo laŭte ploris kaj forkuris al sia gepatra domo.

Krizantemo forestis 3 tagojn kaj en la 4-a tago Ren'er iris al sia bo-gepatra domo por peti indulgon de sia edzino kaj revenigi ŝin hejmen.

De tiam Ren'er fariĝis timema al sia edzino kaj ĉiam tenis sin neŭtrala, kiam okazis malpaco inter Krizantemo kaj Jado.

"Krizantemo volas ŝpari monon por mebloj. Ŝi ne volas plu loĝi kune kun la avino," iutage diris Ren'er al sia patrino.

"Ĉu ankaŭ vi tiel opinias?" demandis Jado.

Ren'er ruĝiĝis kaj mutis. Sur lia vizaĝo Jado legis embarason.

Fine Ren'er kaj Krizantemo forlasis Jadon kaj ekvivis aliloke, en la sama urbo. Komence la juna paro kune vizitis la avinon kaj patrino unufoje ĉiusemajne, poste vizitis ilin Ren'er sola kaj post kelkaj monatoj neniu el ili vidiĝis en la domo de Jado.

Foje Jado malsaniĝis kaj enhospitaliĝis. La avino telefonis al la nepo pri tio. Ren'er indiferece diris, ke li venos al la hospitalo por flegi la patrino, kiam li estos libera, sed fakte oni neniam vidis lian figuron en la hospitalo, kie estis kuracata Jado.

Jado elhospitaliĝis. Iutage, antaŭ ol fini sian taglaboron, Jado ricevis telefonaĵon de sia filo, ke post 2-3 tagoj Krizantemo akuŝos. Li tute ne demandis la patrino pri ŝia malsano.

Jado, virino bonkora kaj grandanima, ĝojiĝis pri la novaĵo kaj tute indulgis la filon, pensante, ke post kiam Krizantemo gravediĝis, Ren'er certe ne havis tempon, tial ne estis senkaŭze, ke li ne vizitis la patrino, kiu kuŝis en la hospitalo.

Kun ĝojo ŝi iris al la obstetrika hospitalo. Tie ŝi trapasis tutan nokton sur benko de la koridoro, ne fermante la okulojn eĉ por unu minuto. Ŝi atendis ĝis mateniĝo de la sekvanta tago, kaj kiam ŝi aŭdis la unuan krion de la novnaskito, ŝi ekstaziĝis.

Jado preparis litkovrilon, vindtukojn el malnovaj toloj kaj kudris vestojn por la nepo. Ŝi aĉetis ovojn kaj brunan sukero por Krizantemo kaj portis ilin al la bofilino kaj nepo tuj post ilia elhospitaliĝo.

Dimanĉon, du tagojn post la elhospitaliĝo de Krizantemo, Jado iris viziti la bofilinon kaj nepon. Estis malserena tago. Pluvetis en la pasinta nokto kaj la vojo estis glita. Furiozis vento. Jado jam atingis la hejmon de sia filo. Kaj ĝuste antaŭ la pordo ŝi aŭdis laŭtan kverelon. Ŝi haltis.

"Mia patrino estas malriĉa. Tion vi scias. Mi hontas trudpeti ion de ŝi." Tio estis la voĉo de Ren'er.

"Do forĵetu la ĉifonaĵojn! Mia filo ne volas ilin. Rigardu, kiel belajn vestojn mia patrino donis kaj kiajn malvaloraĵojn via patrino alportis!" Tio estis la voĉo de Krizantemo.

Jado korpremiĝis, aŭdinte tiujn vortojn de Ren'er kaj Krizantemo.

"Via patrino senĉese eltordis monon el mi kaj hodiaŭ, kiam mi naskis infanon, ŝi estis tiel avara. Sciigu ŝin, ke la novnaskito estas ŝia nepo. Por kio ŝi akumulas la monon, ĉu por bela urno post sia morto?"

"Fermu vian buŝaĉon! Ŝi ja estas iom avara. Sed fakte ŝi ne estas riĉa."

"Kial ŝi aĉetis tiel multe da laktopulvoro por via avino, kiam ĉi tiu ŝajniĝis sin malsana?"

La vortoj elektris Jadon de la kapo ĝis la piedoj. Ŝi ne eniris kaj decideme sin returnis.

Survoje al ŝia hejmo larmoj senĉese invadis ŝiajn okulojn. Ŝi ploris konvulsie. La vortoj de la filo kaj ties edzino pikadis ŝian koron. La mizeraj scenoj en la longaj jaroj post la morto de la edzo unu post alia reaperis en ŝia memoro.

Korŝiriĝis Jado. En la sekvaj tagoj ŝi kun kuntiritaj brovoj laboris en la fabriko kaj ofte vespiris. Tion rimarkis ŝia bona amikino Franjo Printempo.

Franjo Printempo, pli aĝa je 2 jaroj ol Jado, estis ŝia intima amikino. Ili laboris en la sama laborejo 20 jarojn. Pridemandite de Franjo Printempo, Jado malkaŝis al ŝi la kaŭzon de sia malĝojo.

Aŭskultinte la korŝiran rakonton de sia amikino, Franjo Printempo sulkgigis siajn brovojn kaj dronis en longa meditado.

Post 3 tagoj Franjo Printempo invitis Jadon al sia hejmo.

Franjo Printempo regalis Jadon per abunda vespermanĝo. Ĉe la tablo ŝi rakontis al Jado historion de sia pli-aĝa kuzino.

"Mia kuzino vidviniĝis en la 25-jara aĝo. Ŝia solfilo tiam estis nur 3-monata. Ŝi ja neniam pensis pri sia reedziniĝo, malgraŭ ke pluraj volis svati ŝin. Ŝi sola vivtenis la familion kaj vartis la filon. En mizero pasis 25 jaroj. Ŝia filo edziĝis kaj la bofilino naskis bebon. La juna paro neniam prizorgis la hejmajn aferojn kaj mia kuzino ĉiutage preparis 3 manĝojn kaj vartis la nepon. Pasis aliaj 12 jaroj. Ŝi tute maljuniĝis. Kun kresko de la nepo, pli kaj pli malĝentile traktis ŝin la bofilino kaj poste ankaŭ la filo. Malŝatis ŝin ankaŭ la nepo. Tio fariĝis pli serioza post ŝia emeritiĝo. Ŝia najbaro diris, ke la posteuloj traktas ŝin kiel sklavinon. Foje ŝi malsaniĝis kaj kuŝis en la lito. La bofilino ne nur ne zorgis pri ŝia sanstato, sed male, insultis ŝin kaj la nepo, bruteska, batis la avinon, kiam ĉi tiu admonis lin pro io. Mia kuzino koleris, bolis de indigno, sed ŝi malofte diris tion al aliaj. Turmentite de siaj idoj, ŝi baraktis 3 jarojn kaj mortis en la aĝo de malpli ol 70 jaroj. Ŝian morton oni rimarkis 2 tagojn poste, ĉar ŝia filo

jam ne loĝis kune kun ŝi."

Printempo daŭrigis:

"Jado, mi konsilas, ke vi reedziniĝu. Kvankam vi havas ĉ. 50 jarojn, tamen vi estas sana kaj aspektas ne tre maljuna. Ne sekvu la malsaĝecon de mia kuzino."

Forlasinte la domon de Franjo Printempo, Jado multe pensis. Ŝi antaŭlonge vidis, ke la bofilino traktas ŝin indiferece kaj eĉ malamike, kaj korinklinas al riĉuloj, tiel nun kondukas ankaŭ Ren'er. Ŝi kredis, ke neniu el la juna paro prizorgos ŝin, kiam ŝi malsaniĝos en la maljuneco. Ŝi volis havigi al si novan familion, serĉi kunulon por kune dividi la ĝojn kaj malĝojn en la vivo, sed ŝi timis alies klaĉon postdorsan, ĉar ŝi ne estis juna. Proverbo diras, ke ĉasta virino ne edziniĝas dufoje. Se ŝi denove edziniĝos, kion la najbaroj kaj kolegoj diros? Ŝi multe pensis, sendormis tutaj noktojn. Ŝia patrino rimarkis tion kaj demandis. Ŝi diris tuj al sia patrino la sekreton. La 80-jara oldulino kompatis ŝin kaj kuraĝigis ŝian mezaĝan filinon rekomenci la novan vivon. Nur post tio ŝi faris bravan paŝon.

Post semajno en la hejmo de Franjo Printempo Jado konatiĝis kun iu mezlerneja instruisto, altstatura kaj honesta, pli aĝa ol Jado je 5 jaroj. Lia edzino mortis antaŭ 3 jaroj kaj liaj gefiloj jam havas ĉiu sian propran familion. Nun li vivas sola.

Post kelkaj semajnoj Jado jam bone konis la instruiston. Li estas bonkora kaj malkaŝema. Li, malavara, ofte donacis monon al malriĉaj lernantoj kaj najbaraj maljunuloj. Foje li pagis tiom da mono, kiom lia 2-monata salajro, al hospitalo por ke iu grave vundita maljunulo estu kuracata tie, kaj fakte tiun maljunulon li tute ne konis. Li nur hazarde vidis lin kuŝanta surstrate post trafika akcidento.

Jado kaj la instruisto interfianĝiĝis. Post duonjaro ili decidis okazi nupton kaj post la nupto venigi la patrino de Jado al la novedza domo por kune vivi.

Pluvetis hieraŭ nokte. Kaj hodiaŭ la lavita aero fariĝis aparte

freŝa. Leviĝis la suno. Sur la lazura ĉielo vidiĝis neniu nubo. Klare vidiĝis la malproksimaj montoj. Bonodoris floroj kaj herboj. Gaje kantis birdoj. Alvenis Franjo Printempo, ŝiaj kolegoj kaj amikinoj de Jado. Venis ankaŭ kadroj de la laborista sindikato ĉiu en festa kostumo.

Hodiaŭ Franjo Printempo montriĝis kvazaŭ mastrino de la domo de Jado. Ŝi proponis al la gastoj teon, bombonojn kaj cigaredojn. Ĉiuj kun ĝojo gratulis la novedzinon...

Aŭdiĝis hupado. Oni tuj konsciis, ke venas la novedzo.

"Bonan matenon, panjo!" salutis Jadon du junaj homoj en belaj vestoj. Jado diris al la ĉeestantoj, ke ili estas filo kaj filino de ŝia novedzo. Oni miris, ke la du pli-ol-20-jaraj homoj tiel intime vokis ŝian duonpatrino kaj ĝentile traktis ĉiujn ĉeestantojn, sentis grandan ĝojon kaj en la koro preĝis por la feliĉo de nia mezaĝa Jado.

"Bonan matenon, avineto!" la knabo kaj knabino ambaŭ turnis sin al la 80-jarulino kaj ameme salutis ŝin. "Paĉjo tuj venos."

Endomiĝis la novedzo. Li aspektis aparte vigla.

Laŭ regulo la patrino de Jado devis regali la novbofilon kaj la gastojn per abunda festeno, tamen ili jam interkonsiliĝis kaj konsentis pri la hodiaŭa tagordo, tial ĉi tie, en la domo de la avino, oni nur prenis kukojn, fruktojn k.a. Post duonhoro kolektiĝis amikinoj kaj parencoj de la novedzina familio kaj enbusiĝis. La buso portis ilin al la novedza domo.

La buso kaj personaŭto rapide kuris sur la pura aŭtovojo. La aŭto banitaj de sunlumo sin direktis al nova domo, domo feliĉa kaj multespera.

"Feliĉon al mia kara filino!" murmuris la maljuna patrino de Jado antaŭ la pordo de sia propra domo. Ankaŭ la maljunulino sentis sin feliĉa kaj aspektis tre vigla. ■

*La aŭtoro naskiĝis en 1941, esperantistiĝis en 1964, eklaboris en la redakcio de EPC en 1980 kaj multe tradukis el la ĉina lingvo.

ESP-NOVAĴOJ

● Marte de 1996 la Tangshan-a E-Asocio ekfunkciigis la 34-an elementan E-kurson gvidatan de s-ro Wei Jianhua (Ŭej Ĝjanhŭa). 93 personoj lernas en la kurso ĝis la fino de la kuranta jaro.

(Tangshan-a E-Asocio)

● Novembre de 1995 en Chengde, Hebeiprovinco, 51 personoj trapasis la internaciajn ekzamenojn de UEA/ILEI. El ili 7 atingis la mezan nivelon kaj 44 la elementan. (Chengde-a E-Asocio)

● La 12-an de januaro 1996 ekfunkciis en Hainan-provinco la naturgasa kampo Yacheng 13-1, la plej granda en Ĉinio. En la sama tago la poŝtoficejo de Haikou de Hainan-provinco uzis memorigan poŝtstampilon en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La 18-an kaj la 20-an de marto 1996 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis la poŝtmarkoseriojn "Shenyang Imperiestra Palaco" kaj "La Cent-jara Jubileo de la Fondiĝo de



Memorigaj poŝtstampoj

Ĉina Poŝto". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco kaj la Changshu-a Poŝtmarka Kompanio de Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco uzis en la emisijaj tagoj memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto de la poŝtstampiloj estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj).

● Se vi deziras viziti Kroation, Kroata Esperantista Unuiĝo pretas helpi al vi. Ili povas informi pri loĝeblecoj (ĉe esperantistoj, hoteloj), vojaĝeblecoj (trajn-, bus-, flug- kaj ŝiphoraroj, prezoj), vizitindaj kulturaj lokoj (en la urboj, regionoj). Ili povas sendi al vi turismajn prospektojn (nepre menciu la deziran nacian lingvon) kaj organizi la publikan prelegon por esperantistoj kaj neesperantistoj. Krom la prelego bonvenas ankaŭ ekspozicioj (diversspecaj), koncertoj, recitaĵoj ks. Tamen ili devas atentigi vin, ke ili ne povas doni al vi la honorarion kaj repagi la vojaĝkostojn. Pliaj detaloj, informoj, proponoj: Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Dun 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. (Marija Beloŝevic)

● Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj An-

daluzia Esperanto-Unuiĝo kune organizas la Belettran Tradukan Konkurson "Jose Rodriguez Huertas". Regularo: 1. Nur eblas konkursi per tradukoj en la hispanan el originaloj verkitaj en E-o. 2. Ĉiu konkursanto povos partopreni per tri verkoj maksimume. 3. Ĉiu konkursanto devos sendi tri ekzemplerojn de la traduko, tajpitajn en duobla interlinio kaj kun la indiko: Concurso Literario de Traducción "Jose Rodriguez Huertas" (Beletra Traduka Konkurso "Jose Rodriguez Huertas"). 4. Ĉiu verko prezentita al konkurso estu subskribita per pseŭdonimo aŭ moto. Oni akompanu tute fermitan koverton, ene de kiu troviĝu: a) Originala titolo de la respondanta E-verko, ties aŭtoro kaj informo pri la eldono de la tradukaĵo; b) Antaŭnomo, nomo, adreso kaj telefonnumero de la tradukinto. Sur la koverto oni skribu la moton aŭ pseŭdonimon de la tradukinto. 5. Limtempo de akceptado de la verkoj finiĝos la 31-an de oktobro 1996. 6. Oni devas sendi la verkojn al: Sindicato Nacional de Escritores Espanoles, Apartado de Correos 632, E-29015 Malaga, Espana.

(Andaluzia Esperanto-Unuiĝo)

● Esperantistoj kun lokaj aŭtoritatoj en Poprad, Slovakio kaj urbo Subotica, kie Tibor Sekelj finis sian fruktodonan vivon, sukcesis solene inaŭguri memortabulon sur la domo, kie li naskiĝis. La tabulo estis inaŭgurita la 26-an de junio 1995, kiam estis ankaŭ solene malfermita belega kaj ampleksa ekspozicio pri bibliografio kaj kolektaĵoj de Tibor Sekelj. La ekspozicio daŭris ĝis la fino de februaro 1996.

(Milan Zvara)

La memortabulo por Tibor Sekelj



● Aperis la nova numero de "Kooperativa Stelo", kies enhavo pravas: la kooperativa movado vivas kaj funkcias en la tuta mondo. La redakcio estas konvinkita, ke la Internacia Kooperativa Organizo (IKO) en kaj ekster Eŭropo denove trovis kaj refirmigis sian lokon en la kultura kaj ekonomia sfero de la mondo. Al la realigo de ĉi tiu nobla kunagado la redakcio petas vian simpatian kaj helpopretan bonvolon. Kontaktadreso: Arpad Abonyi-Nagy, Bekescsaba, Bartok Bela ut 67-69, H-5600, Hungario. D-ro Jozsef Pal, Országos Szovetkezeti Tanacs, Budapest, Szabadsag ter 14, H-1051, Hungario. (Jozsef Pal)

INTERESPLENA NANWAN-LAGO

NANWAN-LAGO kviete ripozas, brakumite de altaj montpintoj en antaŭturbo de Xinyang (Ŝinjang), suda Henan-provinco. Sur ĝia blua akvo kuŝas diversformaj insuloj. Ĉe ĝiaj bordoj ĉie kreskas verdaj arboj. Ĉio ĉi formis belan pejzaĝon.

Mi kaj aliaj turistoj ŝipe veturis sur la lago. Nia jakto kuris al la centro de la lago kaj ĉirkaŭiris kelkajn insuletojn. La lago fariĝis pli kaj pli vasta! Sur la lago nin karesis zefiro, kiu krispigis la kvietan akvon. Mi profunde enspiris la freŝan kaj humidan aeron kaj tuj sentis malvarmeton, kio perdis mian lacon de la vojaĝo en la lastaj tagoj. Iuj el miaj kunvojaĝantoj fotis la pejzaĝon, aliaj, kiel

Simio petas manĝaĵon.



naivaj geknaboj, plaldigis akvon per manoj, triaj kun plena atento ĝuis la pejzaĝon, kvazaŭ ili tute forgesus ĉion sub la ĉielo escepte la lazuran lagon.

Lokano konigis al mi, ke la lago kun areo de 70 kvadrataj kilometroj estas akvokonservejo konstruita en 1952. En la lago kuŝas 61 insuloj grandaj kaj malgrandaj. Tie abundas animaloj kaj vegetaloj. En la montoj kantas birdoj, blekas bestoj kaj floras belaj floroj. Tie estas produkitejo de fama ĉina teo *moŝĝjan*. En la lago brediĝas fiŝoj, salikokoj, kraboj k.a. Plejparto de la arboj elkreskis post finkonstruiĝo de la akvokonservejo. Montrante la monton, li diris: "En printempo sur la monto floras sennombraj rododendroj malhelruĝaj kaj purpuraj, inter kiuj ĉarmas iuj blankaj floroj de uruŝioj. Kia bela pejzaĝo!"

Smeralda verdo regas sur la lago! La verdaj bambuaroj kaj malhelverdaj pinoj sur la montodeklivoj kaj la blua lago ravis ĉiujn turistojn. En profunda aŭtuno la ruĝaj folioj de aceroj tiel altiris nin, ke ni forgesis reveni. Sur la sunplena lago kelkfoje alflugis aro da akvobirdoj. Ili jam forflugis, kiam ni ankoraŭ ne klare vidis, kion ili bekis. Foje fiŝista boato proksimiĝis al ni. Ondoj, levitaj de nia jakto, plaldigis kontraŭ la boato kaj ŝancelis ĝin. Mi timis, ke ĝi renversigos. Fakte nenio okazis kaj la boato rapide malaperis post la zigzaga kaj kvieta kurbiĝo de la lago.

En la lago estas interesa Fiŝagla Insulo. Printempe kaj somere ĉ. centmil ardeoj kaj fiŝagloj ripozas tie. Bedaŭrinde, kiam mi venis tien, la migrantaj birdoj jam forflugis suden. Rigardante malproksimen, mi vidis birdnestojn sur multaj altaj arboj. Sur iu arbo eĉ estas pli ol 20 birdnestoj. Oni povas imagi, kia estas la spektaklo, kiam la birdoj en aregoj kune alflugis al la insulo.

Felice mi vidis simiojn sur la insulo. Mi vidis aron da simioj sin amuzantaj sur arboj. Ili kuradis unu post alia, lerte saltante. Subite iuj el ili desaltis de arbo sur herbejon, aliaj singardeme rigardis ĉirkaŭen...

Antaŭ la viglaj simioj la turistoj tre ĝojaj kaj unu post alia elpoŝigis arakidojn, melonsemojn kaj bombonojn kaj jetis ilin al bestoj. En la komenco la bestoj, singardemaj, ne kuraĝis preni la manĝaĵojn, sed post momenta observado rapide formaniĝis ilin. Kelkaj simioj en la sino de sia patrino kune ĝuis la frandaĵon. Iu junulo alte levis plenmanon da arakidoj por ŝerci kun la simioj, sed ekster lia atendo, granda simio saltetante facile forkaptis liajn fruktojn. Iuj simioj formaniĝinte krakigis siajn manplatojn. Oni ne komprenis, ĉu per tio ili esprimas sian dankon aŭ plian postuladon de la manĝaĵo. Ili de tempo al tempo ridigis turistojn. Nemalmultaj turistoj konkure fotis sin kun la simioj. ■



Statuo de Wan Hu
Foto de YANG ZIHENG

EBLE nur malmultaj scias pri la plej frua raketa provflugado de la homoj. Tio okazis en la fino de la 14-a jc. Ĉino Wan Hu, tenante du grandajn kajtojn en la manoj, sidis sur seĝo kunligita kun 47 raketoj. Li ordonis bruligi la raketojn, intencante flugi al la ĉielo pere de puŝforto de la raketoj kaj levforto de la kajtoj. Kvankam li malsukcesis, tamen lia eksterordinara antaŭvido postlasis utilan edifon al la homoj. Memore al li, pioniro de “portantoj de raketoj” en la mondo, sciencistoj donis al la ringforma monto sur la dorso de la luno la nomon “Ringforma monto Wan Hu”.

Jam pasis centoj da jaroj. Kiam mi eniris en la halon de la Ĉina Kosmonaŭtika Muzeo de Pekino, mi estis tuj allogita de la statuo de Wan Hu. Tie oni bildigis la momenton de la bruligo antaŭ flugo al la ĉielo siatempe: Wan Hu kun fortikaj brakoj kaj alte levita kapo rigardas malproksimen per la okuloj revantaj pri la kosmo, kvazaŭ rakontante pri la pasinteco, nuntempo kaj morgaŭo de la ĉina kosmonaŭtiko.

Forlasinte la statuon de Wang Hu kaj lian epokon, mi direktis min al la mistera kosmo aspirita de Wan Hu, laŭ la evolua vojo de la ĉina kosmonaŭtika afero.

La ĉina kosmonaŭtika afero

Longa vojo por la ĉina kosmonaŭtika afero

Teksto de SHU MEI
Fotoj de HAN HONG

komenciĝis en 1956. En 1960 Ĉinio lanĉis sian unuan misilon faritan de ĝi mem. La 24-an de aprilo 1970 ĝi lanĉis la unuan sateliton “Ruĝas 1’ oriento” N-ro 1. En la eksponejo la bildoj, materialoj, modeloj, realaj transportaj raketoj kaj satelitoj montras al la vizitantoj la vojon iritan de la ĉina kosmonaŭtika afero en la pasintaj 40 jaroj.

Al la supra parto de la alta kunligita raketo Changzheng E-2 estas algluitaj la naciaj flagoj de Ĉinio, Usono kaj Aŭstralio. Ja estis ĝi, kiu sukcese lanĉis sputnikon produktitan de Usono por Aŭstralio. La informo elektris la ĉinan popolon. S-ro Lin, estro de la muzeo, propraokule ĝuis la lanĉadon. Li diris: “Ĉinio subskribis kontrakton pri lanĉo de la satelito en decembro 1988. Restis nur 18 monatoj ĝis la difinita tago por lanĉo, la 30-a de junio 1990. Ĝenerale dirite, produkto de tia raketo bezonas 4-5 jarojn. Iuj eksterlandaj fakuloj dubis pri tio. Sed fakte la raketo stariĝis sur la ekfluga platformo pli frue je unu tago ol la difinita tago.”

S-ro Lin kondukis min al la “lanĉejo”, kiam restis nur kelkaj sekundoj antaŭ la lanĉo. Oni laŭte nombris: naŭ, ok, sep, ses, kvin... Subite aŭdiĝis tondra bruego kaj leviĝis fajrokolono... Jen imito de la lanĉo farita por la vizitantoj: La modelo de la lanĉilo moviĝis kaj la rigardantoj ekstreme streĉiĝis. Fine la raketo faris blindigan fajroarkon sur la larĝa kurteno kaj lanĉis la sateliton al la senfina kosmo. Tiam, la


“persone spertintaj vizitantoj” eksplodis per hurado.

Mi havis elementan scion pri la formoj kaj aspektoj de ordinara raketoj, sed tute ne sciis la realajn satelitojn revenigeblan, meteorologian, telekomunan kaj aliajn. Ili, grandaj, kristalaj aŭ strangformaj, faris gravan meriton por la ĉina kosmonaŭtika afero. Eĉ la kajuto en la formo de granda terpoto por telesensaj materialoj de satelito ankaŭ kunportis kartografiajn materialojn pri la ĉinaj maroj, kaj per ili oni korektis du erarojn de marbordlinia marko en la ĉina mapo.


Mi informiĝis, ke ĝis nun Ĉinio jam sukcese produktis, lanĉis kaj utiligas 8 speciojn da transportaj raketoj kaj 48 diverstipajn satelitojn. La ĉina kosmonaŭtiko jam enviciĝis inter la avangardaj landoj en iuj gravaj kampoj. Nun Ĉinio estas esploranta sian propran spacoŝipon por realigi sian revon vojaĝi en la spaco. Promenante inter la raketoj kaj satelitoj, mi pensis, ke Wan Hu certe ĝojus pro la evoluo de la moderna ĉina kosmonaŭtiko.

Post sia inaŭguriĝo en 1992 la Ĉina Kosmonaŭtika Muzeo altiris al si multe da vizitantoj. Mi vidis, ke antaŭ la analogia medio de la luno en la centro de la eksponejo, aro da infanoj rigardas kun granda intereso. Kiu povas diri, ke inter ili ne estos kosmonaŭtoj, kiuj, same kiel Wan Hu, estos notitaj en la ĉina kosmonaŭtika historio? ■

Simula lanĉo de raketo




Vizitantoj en la eksponejo





La satelito "Ruĝas l' oriento" n-ro 1

Sur la luno (Simulaĵo)



La eksponejo





Leciono

PANG NAIYING:

Daŭre lernu malriĉaj urbaj geknaboj

EN 1995, Guangqumen (Gŭangĉjumen)-mezlernejo de Pekino establis la Altaspiran Klason por malriĉaj elstaraj lernantoj. Nuntempe tie senpage lernas 54 geknaboj. Ĉi-jare ĝi akceptos por la dua fojo tiajn lernantojn. Nun la Altaspira Klaso jam vekis publikan atenton en la socio.

GEKNABOJ JUSTE KONKURU

Hodiaŭ Ĉinio praktikas la sistemon de 9-jara deviga eduko, t.e. 6 jaroj por elementa lernejo kaj 3 jaroj por malsupera mezlernejo. Por la lernado en supera mezlernejo, oni devas pagi certan sumon, kiu tute ne gravas por ordinaraĵ familioj, tamen malfacile pageblas por tiuj, kiuj malmulte enspezas. La geknaboj en la Altaspira Klaso, malgraŭ la malsameco de siaj familiaj statoj, ĉiuj vivas sub la minimuma vivnivelo de Pekino.

En la dosiero de tiuj geknaboj

mi trovis: Iu knabo vivas kun sia avino, ĉar lia patrino freneziĝis pro divorco kaj erarvadis, kien oni ne scias; la patro de alia lernanto estas kriplulo-pensiulo; tiu de la tria, iama terkulturisto, laboras nun kiel purigisto...

“Ni ne devas neglekti la malriĉajn urbanojn. Pro tiaj kaj aliaj kaŭzoj iuj malvenkis en la socia konkuro, tial ili metis sian tutan esperon sur siajn gefilojn. Kia maniere tiuj familioj sin liberigos el malriĉeco, se oni ne donos al iliaj infanoj la ŝancon juste konkuri?” diris s-ro Li Jinhai (Li Ĝinhaj), rektoro de la lernejo. Li diris al mi, ke la lernejo asignas ĉiujare certan sumon da mono por stipendii altaspirajn klasanojn, kvankam al la lernejo mem mankas instruistoj kaj kapitalo. La lernejo ja faras ĉion ĉi kun la celo ebligi al tiuj geknaboj la justan konkuron.

PRO AMO

En koridoraj montrofenestroj mi vidis multe da atestiloj de mon-

ofero. La rektoro diris al mi, ke post fondiĝo de la klaso la lernejo ricevis centojn da miloj da juanoj oferitajn de la municipa registaro kaj diversaj sociaj rondoj. Privataj entreprenistoj donacis dekmiilojn ĝis centmilojn da juanoj. Ankaŭ elementlernejoj donacis kelkajn ĝis dekojn da juanoj. La lernejo ricevis ankaŭ deponitan monon de ordinaraĵ civitanoj, subvencion de malliberuloj, monsubtenon de eksterlandanoj... Japanaj vizitantoj diris al s-ro Li, ke la Altaspira Klaso montris modelon por eduko de la malriĉaj geknaboj, ĉar ankaŭ en Japanio estas geknaboj elstaraj en lernado, sed malriĉaj en ĉiutaga vivo.

Kio do estas esenco de tiu modelo? Tio estas amo. Ĝuste kiel oni kantas: “Se ĉiuj donas sian amon, en bela mondo vivos la tuta homaro.”

La supre menciita knabo nomiĝas Tian Wei. Li daŭre serĉas sian patrinon. Ankaŭ policanoj, gazetaro kaj televida stacio helpas lin

en tio, sed vane. Foje, al Tian venis iu nekonata maljunulo. Li donacis al Tian panon kaj kolbason. La knabo sin ĝenis antaŭ la nekonato. Pro tio la maljunulo malĝojigis kaj devigis lin preni la manĝaĵojn. Kiam li formanĝis, la bonkora maljunulo rapide enmanigis al li 50 juanojn kaj tuj forbiciklis... Tian ne trovis sian patrinon, nek sciis la nomon de la maljunulo, kiu tamen sentigis al li la perditan gepatran amon.

Por viziti lernejon, lernantino Cai Jingnan (Caj Ĝingnan) devis piediri 2 horojn ĉiutage. Iu malliberulo skribis al ŝi: "Mi volas aĉeti al vi biciklon per mia propra mono. Mi deziras, ke vi min ne rifuzu."

"Honesteco estas esenco de humaneco, tamen ĝi baziĝas sur amo," diris rektoro Li. Humaneco kaj konscienco vekigis ne sole de puno. La membroj de la Altaspira Klaso plejparte aĝas 15-16 jarojn. Ĉar ili ĉiuj estas en kresko de la propra personeco, tial por ili amo estas tre grava. Por malhonestuloj, ju pli da intelekta kvociento, des pli da fiagoj. Tial la lernejo donas grandan atenton ne nur al studentigo de la lernantoj, sed ankaŭ al kulturo de ilia persona kvalito. Oni devas lasi ilin zorgi pri si mem en ĉiutaga vivo, ĉar "troa zorgo" pri infanoj faras ilin tre dependantaj kaj ekstreme arogantaj. Jen pro kio malsukcesas la familia eduko al solinfanoj. S-ro Li diris al la geknaboj de la Altaspira Klaso: "Ni ne devas forkonsumi la tutan monsumon, ĉar ni akceptos novajn membrojn estonte. La lernejo havigas al vi la minimumajn kondiĉojn por ĉiutaga vivo, sed la plej favorajn kondiĉojn por lernado." Li diris, ke oni ne devas fari la geknabojn "malriĉaj nobeloj", ĉar la spirita povreco estas pli timiga ol la materia.

REPAGO AL LA AMO

Iu psikologo-profesoro de la Pekina Universitato trovis, ke la geknaboj en la Altaspira Klaso plejparte suferas de maltrankvilemo. Li penas helpi ilin en venko

super tiu psika perturbo.

Pri kio ili maltrankvilas krom sia familio?

Cai Jingnan loĝas malproksime de la lernejo, tial multe da tempo estis foruzita survoje al la lernejo. Por havigi al si plian tempon lerni ŝi dormis ĉiutage nur iom pli ol 4 horojn. Pro tio la lernejo liveris dormejon al ŝi kaj aliaj infanoj, kies hejmo estas malproksime, tamen ili lernas pli diligente kaj ofte ĝis profunda nokto. Tion oni malkonsilis al ili, sed vane. Instruisto do ordonis, ke ili nepre estingu la lampon antaŭ la 23-a. Sed poste, oni rimarkis, ke iuj daŭre legas kun poŝlampo sub litkovrilo.

Ili konsciis, ke sen penado ili certe ne sukcesos. Ili timas vanigi la esperon de la socio kaj de la lernejo. Tamen lernado ja ne estas ĉio. La altaspiraj klasanoj enviciĝis inter la junaj volontuloj: ili forbalais blankan rubon, plantis arbojn, purigis stratajn barilojn, helpis maljunulojn kaj gevidvojn en mastrumado ktp. Helpate de siaj kolegoj, Tian Wei transdonis al maljunulejo la de aliaj donacitajn rizon kaj brasikojn.

Ili sentas, ke ili ricevis tro multe kaj deziregas fari repagon. Eble pro tio ili maltrankvilas konstante. Fakte, ili unuflanke ricevas kaj aliflanke kontribuas al la socio, ta-

Post leciono

men ili tion ne konscias.

Foje, la lernejo okazigis ekskurson. La tagmangaĵoj de la tuta Altaspira Klaso estis peklita legomo kaj mantoo (tradicia ĉina farunaĵo, simila al pano, sed malpli kosta ol ĝi). Ĝoje babilante, ili manĝis kun bona apetito. Tio embarasis la geknabojn de aliaj grupoj, kiuj prenis panon, kolbason kaj ĉokoladan kukon. Iuj bonhavaj solinfanoj inklinas al elmontremo de siaj havaĵoj. Ili aspiras al la vivo pli favora ol alies, tamen sentas maltrankvilon antaŭ la malriĉaj kolegoj. Tiu delikata psikologia ŝanĝigo vekis atenton de instruistoj, kiuj faris demandon: Kiamaniere oni devas eduki la infanojn?

La familia malriĉeco kaj hardigo en malfaciloj kulturis en la geknaboj de la Altaspira Klaso diligentecon kaj ŝparemon. Antaŭe, ĉiufoje, kiam la lerneja manĝejo vendis vermiĉelojn, oni forĵetis du sitelojn da vermiĉeloj, sed post naskigo de la Altaspira Klaso la stato multe pliboniĝis, ĉar lernantoj de la klaso proponis ŝpari grenon antaŭ la publiko.

Oni devas konfesi, ke nur malgranda parto da malriĉaj urbaj geknaboj sukcesis lerni en la Altaspira Klaso, sed la afero kaj ĝia socia efiko estas ĝojindaj. ■





En la kamparo de Haimen

Ponto, fluo kaj vilaĝo

Teksto de LIU SIGONG

Fotoj de LIU SIGONG kaj ZHANG WEI

Printempe mi venis al la kamparo de Haimen ĉe la enmariĝo de Yangzi-rivero kaj ĝuis tie la morojn kaj kutimojn kaj la idilian pejzaĝon. Haimen, situanta en la Delto de Yangzi-rivero, ĉe la rando de la norda subtropika zono, abundas je sunradioj kaj pluvo, kun fekunda grundo favora al kreskado de plantoj.

Mi estis en Haimen en la plej bela sezono. La araneaĵe kruciĝantaj riveroj, loĝdomoj el blankaj muroj kaj grizaj tegoloj kaj ore flavaj kolzo-floroj formis ĉarmajn pejzaĝojn de la suda kamparo diferencajn de tiuj de la vasta norda kamparo.

Mi promenis laŭ pado, ĝuante plene florantajn kolzojn en kampoj, kaj nerimarkite eniris en vilaĝon kun malpli ol cent familioj. Antaŭ ĉiu loĝdomo estas legomĝardeno, kie kreskas persikarboj kun rozkoloraj floroj en kontrasto kun ore flavaj kolzo-floroj. Lu virino laboris en sia ĝardeno. La vidaĵo estis malfacile esprimebla per vortoj, tial mi kaptis ĝin per fotilo.

La naturaj pejzaĝoj sudaj kaj nordaj diferencas unu de alia, sed la ĉinaj kamparanoj havas komunan trajton — diligenteco kaj honesteco. Kutime ili tuttage laboris kaj nun ekvivis iom facilan vivon. Surkampe mi renkontiĝis kun maljunulo laboranta. Informiĝinte, ke mi, fotisto veninta el norda Ĉinio, li afable salutis min kaj diris: “Mi estas 68-jara. Mi ne volas ripozi hejme, sed labori surkampe por mia sano.”

Mi promenadis laŭ la pado la tutan tagon. Mi esperas, ke la fotitaj pejzaĝoj plaĉos al vi.

Patro kaj filo kun kapro



Survoje al la gepatra hejmo de la edzino



Printempa pejzaĝo



Laborema maljunulo



SPUROJ DE MALAPERINTA TRIBO

ANTAŬ ĉ. 2 600 jaroj vivis en norda Ĉinio la brava tribo Ŝanĵong. Historiaj libroj notas, ke la tribo konsistis el miloj da grupoj. Ili, kun ĉasado kiel la ĉefa vivrimedo, loĝis dise ĉe riveroj aŭ en montvaloj kaj migris kun siaj gregoj. El tiuj notoj oni eksciis, ke ili apartenis al la nomadisma tribo sur ĉevaloj.

Sed, post la 4-a jc a.K. la tribo malaperis iom post iom. Eĉ en historiaj dokumentoj oni apenaŭ legis ion pri ĝi. Laŭdire, ŝanĵong-oj, lertaj en rajdado kaj pafado, ofte enrudigis en la najbarajn regnojn Yan (Jan) kaj Qi (Ĉji) por rabado. Pro tio la regnoj Yan kaj Qi alianciĝis kaj kune batalis kontraŭ ŝanĵong-oj, ke ĉi tiuj malaperis poste. Ĉu ili pereis aŭ fuĝis aliloken? Eĉ hodiaŭ tio estas enigmo. Meze de la 80-aj jaroj ĉinaj arkeologoj elfosis multajn tombarojn de ŝanĵong-oj. Eble tio helpas al solvado de tiu enigmo.

La tombaroj troviĝas ĉe montpiedo je 100 km norde de Pekino. Sude de ĝi imponas la Granda Muro. Centoj da rektangulaj tomboj estas bonorde aranĝitaj. Kvankam en la tomboj estis trovita neniu noto por atesti, ke ili estas nenio alia ol tomboj de ŝanĵong-oj, tamen granda kvanto da elterigitaj objektoj certigis la ĉinajn arkeologojn pri la atesto.

De 1985 ĝis 1990 ĉinaj arkeologoj prifosis pli ol 570 tombojn kaj elterigis ĉ. 20 000 historiajn objektojn. Vicprofesoro Jin Fengyi (Ĝin Fengji), kiu partoprenis en la prifosado, diris, ke la elterigitaj objektoj plejparte estas bronza armiloj kaj instrumentoj. Preskaŭ sur ĉiuj virseksaj mortintoj estis bronza glavo. Tio montris, ke la ŝanĵong-oj estis batalemaj kaj la glavo servis al ili kiel armilo. Menciindas, ke sur diversaj glav-teniloj malsamas desegnoj de floroj kaj bestoj.


El tiuj bronzaĵoj la plej valora estas brulnigrita poto kun 2 teniloj sur la supro. Sendube, ĝi siatempe servis al ŝanĵong-oj kiel viandkuirilo. Oni povas diri, ke ĝi estas la plej frua *hūoguo*-o (varmpoto) elterigita en Ĉinio ĝis nun. El tio imageblas, ke la ŝanĵong-oj manĝis ĉefe viandon. El la tomboj estas

elterigitaj ankaŭ granda kvanto da bronzaĵoj hokoj kaj ornamaĵoj. Surbaze de tiuj malgrandaj objektoj delikate faritaj oni povas konkludi, ke ŝanĵong-oj portis vestojn kun mallarĝaj manikoj kaj zonon ĉe la talio. Ĉe unu fino de la zono estis hoko destinita por fiksi ĝin kaj aliajn ornamaĵojn. Multaj elterigitaj objektoj, eĉ ŝtonaj akrigiloj, havas trueton, eble por faciligi kunportadon. Tio montris ankaŭ vivmanieron de nomadisma tribo.

Tamen, ĝis nun la ĉinaj arkeologoj ankoraŭ ne bone scias pri tio, kial tiu surĉevala tribo lertis en bronza fandado. Pekinaj metalurgoj asertis, ke en la loko, kie vivis ŝanĵong-oj, estis kupra mino, sed ĝis nun oni ankoraŭ ne trovis ian ajn spuron de fandado farita antaŭ pli ol 2 000 jaroj.

Kiel nemalmultaj nomadoj de Ĉinio, ankaŭ la ŝanĵong-oj kultis la sunon. Pro tio ili metis en tombon ĉiun mortinton kun la kapo direktita al la oriento, kie leviĝas la suno. Tio malsamas ol la kutimo en centra Ĉinio, kie la tomboj rigardas al la sudo. El la tomboj de ŝanĵong-oj oni elfosis ankaŭ objektojn el la regnoj Yan kaj Qi kaj aliaj lokoj en la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero de Ĉinio, kiaj kupraj akvujoj kaj vintasoĵoj. Tio montris, ke la kulturo de la basenoj havis grandan influon sur la ŝanĵong-oj. La elterigitaj maldelikataj fajencaĵoj per si mem atestas, ke ili estis faritaj en la 7-a jc a.K. El tio videblas, ke la jarcento koincidas kun la tempo, en kiu vivis la tribo Ŝanĵong. ■

Poto kun teniloj





S-ro Nima Zeren

SAJNAS, ke la peniko de la tibet-nacia pentristo Nima Zeren estas destinita por priskribi neĝkovritan altebenaĵon. Tamen, liaj pentraĵoj malofte elspiras ekskluzive la naturon — sub lia peniko neĝkovrita monto ĉiam estas loko por prezenti la vivforton de la homaro.

En la verko “Subigi Poefagojn” iu praulo persekutas poefagojn en montoj ĉirkaŭitaj de nuboj; en “Neĝkovrita Lando” baraktanta poefago estas kaptita de praulo je korno; en “Blanka-nigra Mondo” paŝtisto antaŭenirigas gregon da poefagoj en neĝŝtormo... Evidente, tiuj verkoj temas pri evoluado de la nacio. Nima Zeren diris, ke en la pratempo la prauloj per kuraĝo kaj saĝo subigis sovaĝajn poefagojn, por ke la lastaj fariĝu kunuloj de la homaro. Estas neimageble, kiel oni vivus en la neĝkovrita lando sen poefagoj. Tiel ni komprenas, kial la pentristo pentris centre de “Neĝkovrita Lando” la kranion de poefago kiel totemon, tiel grandan, ke eĉ la neĝkovrita monto ne povis rivali kun ĝi. Kaj plie, la skribo sur la kranio implice konigas al ni la materian fundamenton de la kulturo en la neĝkovrita lando.

Nima Zeren estas pripensema. Ĉiuj liaj verkoj montras lian komprenon pri la rilatoj inter la homaro kaj naturo, inter la homaro kaj religio. Tia estas “Kreado de la Mondo”. En la pentraĵo prauloj persekutas furiozajn bestojn, kiuj tamen persekutas malfortajn bestetojn, dum paro da okuloj de la Budho rigardas ĉion ĉi tion... Nima Zeren klarigis al mi, ke sur la neĝkovrita altebenaĵo 4 000-5 000 m super la marnivelo mankas vivbezonaĵoj. Por sin vivteni la homoj devas havi fortan spiritan subtenilon religia kredo. La pieco por religio de la tibetanoj estas pli granda ol tiu de aliaj nacioj. Aparta naturo donas apartan humanecon. Tion li prezentis en siaj verkoj “Ĉiela Vojo”, “Sankta Lumo” ktp. Li diris, ke la sincera kredo igis la animon de tiuj homoj, vivantaj en la neĝkovrita lando, pura kiel neĝo. Tiel li pentris

NUNTEMPA BELARTO

Elvokivaj pentraĵoj pri neĝkovrita lando

de PANG NAIYING


“La Lasta Sankta Tero”. En 1993-1995 Nima Zeren eksponis siajn pentraĵojn en norda Ameriko, okcidenta Eŭropo kaj Hindio. La rigardantoj estis kortuŝitaj de la pentraĵoj.

En 1944 Nima Zeren naskiĝis en malriĉa tibet-nacia familio de Batang-gubernio, Sichuan-provinco. De la infanaĝo li ŝatis kun sia budhismo-kredanta patrino viziti templon kie buntaj freskoj allogis lin. Hejmenreveninte, li ofte faris pentradon sur muro. 14-jara, li eniris en la nacian kurson de la Sichuan-a Belarta Instituto por lerni ole-pentradon kaj gravuradon. Diplomiĝinte, li venis al altebenaĵa paŝtejo. Li vizitis vivajn budhojn en temploj kune kun aliaj tibetanoj. Li malkovris la apartan enhavon de la tibeta kulturo kun historio de 1 300 jaroj. Dume li konsciis, ke la tradiciaj tibetaj pentraĵoj, kiuj temas ĉefe pri budho-figuro, ne taŭgas por prezenti la profundecon de la tibeta spirito. Li do aldonis novan karakterizaĵon al la pentrarto — priskribi tibetanojn kaj ties hieraŭon kaj hodiaŭon. Dank’ al lia penado, la tibetaj pentraĵoj temas, krom religio, ankaŭ pri aliaj terenoj.


Oni rigardis Nima Zeren kiel senditon, ĉar pere de siaj pentraĵoj li konigis al la mondo Tibeton kaj spiriton de la forta nacio, de kiu originis la neĝkovrita altebenaĵo. Iu aŭstria profesoro diris al Nima Zeren: “Vi donis vivecon al neĝkovrita monto. Tio estas arto, kiu inspiras la homaron denove koni la vivon.”

La arto de Nima Zeren karakteriziĝas per troigo de la tradicia ĉina pentrarto. Sub lia peniko la poefagoj, ĉu kun alten leviĝantaj kolharoj, ĉu kun arkiĝanta dorso kaj stamfantaj piedoj, impresas per sovaĝeco. Sub lia peniko la neĝkovrita monto majesta impresas per tri-dimensieco kiel okcidenta ole-pentraĵo. La malhel-flava kaj brun-ruĝa koloroj enkorpiĝas la antikvecon kaj misterecon de la tibetaj pentraĵoj. ■

"Neĝkovrita lando"



"En la profundo de la stepo"



KATALOGO DE ĈINAJ ELDONAĴOJ EN ESPERANTO

Enkonduko

Tiu ĉi katalogo estas kompilita laŭ nia nuna stoko kaj entenas pli ol 100 titolojn. Estas aparte menciinde, ke 14 libroj estas nove eldonitaj en la lastaj du jaroj. La libroj de tiu ĉi katalogo ne nur ebligas al vi koni la riĉan kulturon de antikva kaj nuntempa Ĉinio, sed ankaŭ elokvente demonstros la vivantecon kaj praktikan valoron de Esperanto en la interpopola komunikado. La ĝenerala distribuanto estas **Distribua Fako** de la redakcio de *El Popola Ĉinio*, kiu ĉiam pretas je via dispono. La adreso estas: P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio. Telefono kaj fakso: +86-10-6832-1808.

Mendoj kaj pagoj: Vi povas mendi librojn ĉe la peranto en via lando kaj pagi la mendon al la peranto.

Se en via lando ne estas peranto, vi povas mendi ĉe Libroservo de Universala Esperanto-Asocio (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) kaj pagi al ĝi la mendon laŭ la prezoj indikitaj en "Esperanto-Katalogo" de UEA.

Se vi volas mendi rekte ĉe nia **Distribua Fako**, eblas pagi per:

- **monbiletoj** en usonaj dolaroj aŭ valutoj ŝanĝeblaj al usonaj dolaroj. Estas rekomendeinde sendi monbiletojn per registrita poŝto.

- **via UEA-konto** al la konto de Ĉina Esperanto-Eldonejo ĉe UEA, kies kodo estas **ceel**. Mendante, bonvolu samtempe sendi al nia **Distribua Fako** kopion de la interna ĝirilo de UEA, kun indikoj pri la celo de via pago kaj via UEA-kodo.

- **internaciaj respondkuponoj**. Tiaj kuponoj estas aĉeteblaj en la poŝtoŝtancoj de multaj landoj, kaj valoras por ni po 1,60 nederlandajn guldenojn. Necesas, ke tiaj kuponoj estu ĝustaloke (maldekstre) stampitaj de la emisianta oficejo.

Klare skribitaj mendoj ŝparas tempon kaj rapidigas la servon. Bonvolu ĉiam skribu la plenan titolon de la mendata libro.

Prezoj: Ĉiuj prezoj indikitaj en la katalogo inkluzivas la sendokostojn, sed ne imposton.

Respondeco pri la sendaĵoj: Nia **Distribua Fako** normale ekspedas la menditajn librojn per ordinara poŝto kaj ne respondecas pri eventuala perdiĝo, kiu okazas je la risko de la mendanto. Se vi deziras ekspedon per registrita poŝto, bonvolu aldoni por ĉiu pako ekstran sumon de 2,00 usonaj dolaroj.

Aerpoŝta ekspedo: Se vi deziras aerpoŝtan ekspedon, bonvolu aldoni al ĉiuj prezoj 25% por aerpoŝtaj kostoj. La aerpoŝtaj kostoj tamen estas minimume 1,00 usonaj dolaroj.

Tre bonvenas ne nur viaj mendoj, sed ankaŭ viaj proponoj kaj konsiloj, ekz. pri la jam eldonitaj libroj kaj pri temoj al vi plaĉaj.

Ni multe antaŭdankas vin pro viaj mendoj kaj konsiloj!

Redakcio de *El Popola Ĉinio*

Filozofio, historio kaj politiko

ANTIKAJ ĈINAJ SCIENCISTOJ

1990. 140p. 11,70 × 18,40cm.

Prezo: 4,00 USD

ANTIKAJ FILOZOFOJ DE ĈINIO

1988. 230p. 12,20 × 18,30cm.

Prezo: 4,00 USD

ELEKTITAJ VERKOJ DE MAŬ ZEDONG (Volumo 1)

1971. 624p. 10 × 15cm.

Prezo: 10,00 USD

5000 JAROJ DE ĈINIO

1988. 398p. 13 × 18,50cm.

Prezo: 6,00 USD

MODERNA HISTORIO DE ĈINIO LAŬ TEMOJ

1992. 220p. 13,10 × 20,30cm.

Prezo: 6,00 USD

PROFILO DE ZHOU ENLAI

1989. 260p. 14 × 20,40cm.

Prezo: 8,90 USD

Lernolibroj, vortaroj kaj gramatiko

ĈINA-ESPERANTA VORTARO

1985. 718p. 13,50 × 19,00cm. Bind.

Prezo: 15,00 USD

ĈINLINGVA KONVERSACIO

1986. 80p. 12 × 18,40cm.

Prezo: 3,00 USD

ESPERANTO-ĈINA VORTARO

1990 (dua eld.). 1044p. 14 × 19cm.

Prezo: 20,00 USD

ESPERANTO-KURSO POR MEMLER- NADO

En la ĉina lingvo (Volumo 1)

1985. 340p. 13 × 18,20cm.

Prezo: 4,00 USD

ESPERANTO-KURSO POR MEMLER- NADO

En la ĉina lingvo (Volumo 2)

1989. 452p. 13 × 18,20cm.

Prezo: 4,00 USD

INTERNACIA VORTARO DE MIKROBA GENETIKO

En Esperanto kaj la ĉina kaj angla

1994. 200p. 13 × 18,50cm.

Prezo: 12,00 USD

INTERNACIA KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO EN 11 LINGVOJ

1990. 688p. 14,70 × 22cm. Bind

Prezo: 24,00 USD

PAŜOJ AL PLI ALTA ŜTUPO

1994. 195p. 18,40 × 12cm.

Prezo: 8,00 USD

STUDOJ PRI ESPERANTO

Paralele en la ĉina kaj Esperanto

1993. 225p. 14 × 20,40cm.

Prezo: 6,00 USD

Literaturo

AŬTUNO EN LA PRINTEMPO

1980. 116p. 14,80 × 21cm.

Prezo: 5,00 USD

AVENTURO DE ĈASISTETO DUM EK- SPEDICIADO

1988. 86p. 12 × 18,30cm.

Prezo: 4,00 USD

BAKIN KAJ ESPERANTO

En la ĉina lingvo

1995. 436p. 14 × 22cm.

Prezo: 10,00 USD

BOVISTO KAJ TEKSISTINO — Ĉinaj Po- polaj Rakontoj

1988. 60p. 11 × 18,20cm.

Prezo: 3,00 USD

BRILAS SAĜO

1987. 218p. 12 × 18,50cm.

Prezo: 3,00 USD

BRONZA TIGRO
(Historia dramo kvinakta)
1985. 134p. 14,80 × 21cm.
Prezo: 7,00 USD

BUKEDO AL VI
1984. 96p. 11 × 18cm.
Prezo: 3,00 USD

ĈINA ANTOLOGIO (1919-1949)
1986. 612p. 14,80 × 21cm. Bind.
Prezo: 9,00 USD

ĈINA ANTOLOGIO (1949-1979)
1989. 418p. 14,80 × 21cm. Bind.
Prezo: 9,00 USD

ĈINAJ KLASIKAJ POEMOJ ILUSTRITAJ
1990. 70p. 19,30 × 26,60cm. Bind.
Prezo: 8,00 USD

ĈINAJ MITOJ
1992. 104p. 10,90 × 18cm.
Prezo: 5,00 USD

ĈINAJ TRADICIAJ FESTOJ
1987. 136p. 12 × 18,50cm.
Prezo: 4,00 USD

**222 SIMPLAJ VERSAĴOJ POR KOMEN-
CANTOJ**
1995. 127p. 10,90 × 18cm.
Prezo: 7,00 USD

EL ĈINA POEZIO
1980. 156p. 14,80 × 21cm. Bind.
Prezo: 6,00 USD

**FELIĈA BIRDO — Ĉinaj Popolaj Ra-
kontoj**
1984. 56p. 11 × 18cm.
Prezo: 2,00 USD

FROSTA NOKTO
1990. 308p. 14,90 × 21cm. Bind.
Prezo: 10,00 USD

KAMELO ŜJANGZI
1988. 324p. 14,50 × 21cm. Bind.
Prezo: 8,00 USD

LEGU KAJ RIDU

1992. 86p. 11 × 18cm.
Prezo: 3,00 USD

MAGIA ŜIPO — Ĉinaj Popolaj Rakontoj
1984. 76p. 11 × 18cm.
Prezo: 1,50 USD

MONTARA VILAĜO
1984. 270p. 14,80 × 21cm.
Prezo: 8,00 USD

MIA VIVO
1984. 128p. 12 × 18,50cm.
Prezo: 2,00 USD

MIRRAKONTOJ DE LIAOZHAI
1994. 541p. 14,50 × 21cm. Bind.
Prezo: 18,00 USD

ORANĜA OMBRELO — Mikronoveloj
1986. 150p. 11 × 18cm.
Prezo: 2,50 USD

**PAPILIA FONTO — Ĉinaj Popolaj Ra-
kontoj**
1984. 68p. 11 × 18cm.
Prezo: 1,50 USD

PAŜTISTO KAJ FEINO
1990. 76p. 11 × 18cm.
Prezo: 1,60 USD

POEMOJ DE ARMAND SU
1992. 170p. 11,20 × 18cm.
Prezo: 4,00 USD

POEMOJ DE MAŬ ZEDONG
1979. 76p. 13 × 21cm. Bind.
Prezo: 2,00 USD

QU YUAN
1987. 120p. 14,50 × 21cm.
Prezo: 4,00 USD

**RAKONTOJ PRI AFANTI — Ĉinaj Popolaj
Rakontoj**
1982. 78p. 11 × 18cm.
Prezo: 1,60 USD

RATETO VOLAS EDZINIĜI
1995. 60p. 11 × 18cm.
Prezo: 4,00 USD

RUĜDOMA SONGŔO
(Volumo 1)
1995. 582p. 14 × 21cm.
Prezo: 26,00 USD

SPECIALA PREMIO
1991. 120p. 11 × 18cm.
Prezo: 2,10 USD

VERKOJ DE JELEZO
En la ĉina lingvo
1995. 500p. 14 × 22cm.
Prezo: 12,00 USD

VERKOJ DE VERDA MAJO
1982. 501p. 15 × 21cm.
Prezo: 6,00 USD

Turismo, sporto, albumo

ĈINAJ BATALARTOJ
1990. 40p. 18,40 × 20,70cm.
Prezo: 3,00 USD

DEK SES URBOJ DE ĈINIO
1984. 176p. 12 × 18,50cm.
Prezo: 3,00 USD

ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO
1994. 330p. 20,40 × 14cm.
Prezo: 8,00 USD

**GEEDZIĜAJ MOROJ DE ĈINAJ NACI-
MALPLIMULTOJ**
1989. 168p. 12 × 18,40cm.
Prezo: 3,00 USD

GVIDLIBRO PRI PEKINO
1986. 164p. 12 × 18,50cm.
Prezo: 2,80 USD

**KATALOGO DE ESPERANTAJ POŝT-
MARKOJ**
1987. 118p. 8,50 × 17,50cm.
Prezo: 5,00 USD

40 VIDINDAJ LOKOJ EN ĈINIO
1984. 252p. 12 × 18,50cm.
Prezo: 3,90 USD

**MAPO DE LA ĈINA POPOLA RESPUB-
LIKO**
Skalo: 1:9000000
1984. 77 × 54cm.
Prezo: 1,50 USD

MOROJ DE ĈINAJ NACIMALPLIMULTOJ
1991. 120p. 12,10 × 18,50cm.
Prezo: 2,50 USD

PITORESKA PEKINO
1984. 74p. 13 × 18,50cm.
Prezo: 2,00 USD

TAJĜIĈJŬAN
1986. 70p. 12 × 18,40cm.
Prezo: 2,50 USD

VOJAĜO TRA ĈINIO
1986. 138p. 18,70 × 26cm.
Prezo: 10,00 USD

Medicino, tekniko kaj scienco

**AKTOJ DE INTERNACIA SCIENCA AKA-
DEMIO COMENIUS**
(Volumo 1)
1992. 138p. 18,50 × 26,10cm.
Prezo: 9,00 USD

ATLASO DE INSEKTA MORFOLOGIO
En Esperanto kaj la ĉina kaj latina
1987. 454p. 14,50 × 20,80cm.
Prezo: 15,00 USD

AŬTOBIOGRAFIO DE BAKTERIO
1986. 114p. 12 × 18,50cm.
Prezo: 2,00 USD

ĈINA CERAMIKO
1994. 260p. 18,40 × 12cm.
Prezo: 6,00 USD

ĈINAJ FAMILIAJ PLADOJ
1986. 80p. 12 × 18,40cm.
Prezo: 2,50 USD

ĈINAJ PROTEKTATAJ BESTOJ
1987. 362p. 20,30 × 13,80cm.
Prezo: 8,00 USD

KURACAJ MANGAĴOJ
1986. 64p. 12 × 18,50cm.
Prezo: 2,00 USD

PRI NIA UNIVERSO
1992. 118p. 11,70 × 18,40cm.
Prezo: 4,00 USD

PROVU POR VIA SANO
1994. 132p. 18,40 × 12cm.
Prezo: 10,00 USD

**RAKONTOJ PRI LA HISTORIO DE LA
ĈINAJ MEDICINO KAJ FARMAKOLOGIO**
1991. 260p. 12,10 × 18,50cm.
Prezo: 6,00 USD

Porinfanaj legaĵoj

AMUZAJ KARIKATUROJ
1990. 20p. 18,20 × 20,80cm.
Prezo: 1,50 USD

ANASETO KAJ KOKETO
1985. 26p. 16,50 × 19cm.
Prezo: 1,50 USD

AVINETO LUNO
1988. 20p. 18,10 × 20,60cm.
Prezo: 1,50 USD

BELA REVULO
1983 (dua eld.). 40p. 18,50 × 21cm.
Prezo: 2,00 USD

BESTIDOJ KAJ ILIAJ PATRINOJ
1986. 20p. 18,10 × 20,60cm.
Prezo: 1,50 USD

BESTOĜARDENO
1985. 76p. 18 × 20cm.
Prezo: 2,00 USD

BONA BAUBAO
1990. 20p. 18,10 × 20,60cm.
Prezo: 1,50 USD

BRAVA KOLOMBIDO
1984. 20p. 18 × 25cm.
Prezo: 1,50 USD

ĈEVALIDO TRANSIRAS RIVERON
1976. 16p. 16 × 18,50cm.
Prezo: 1,20 USD

DU KATETOJ
1984. 20p. 18 × 25cm.
Prezo: 1,50 USD

FIERA GENERALO, LA
1985. 20p. 17,50 × 25,50cm.
Prezo: 1,50 USD

FIERA MULTKOLORA KATETO, LA
1985 (tria eld.). 40p. 18,50 × 21cm.
Prezo: 2,00 USD

GRANATOJ
1989. 40p. 18,10 × 20,60cm.
Prezo: 2,00 USD

GRANDA PANDO VIZITIS MIAN HEJMON
1987. 24p. 18,50 × 17,20cm.
Prezo: 1,50 USD

GRANDAJ PANDOJ — BRILAJ STELOJ
1988. 48p. 18,80 × 25,80cm.
Prezo: 2,00 USD

KAPTI ŜTELISTON
1994. 20p. 21,70 × 18,50cm.
Prezo: 2,50 USD

**KIAL LEPOROJ HAVAS MALLONGAN
VOSTON?**
1986. 28p. 18,40 × 16,20cm.
Prezo: 1,20 USD

KIEL KOVI
1983. 24p. 18,50 × 17,20cm.
Prezo: 1,20 USD

KNABINO GINSENGO
1983. 40p. 16,50 × 18,50cm.
Prezo: 1,50 USD

KOKIDO VENĜIS SIAN PANJON
1984. 20p. 18 × 25cm.
Prezo: 1,30 USD

LERNI PENTRADON
1994. 16p. 21,70 × 18,50cm.

Prezo: 2,00 USD

LEVI LA ŜUON

1994. 16p. 21,70 × 18,50cm.

Prezo: 2,00 USD

LONGHARA FRATINO

1986. 34p. 25 × 18cm.

Prezo: 2,00 USD

LUPO INVITAS URSON

1984. 36p. 21 × 18,50cm.

Prezo: 1,50 USD

MAGIA PENIKO

1985. 40p. 18,50 × 21cm.

Prezo: 1,50 USD

MALATENTEMA VIRINO

1983. 20p. 18,20 × 20,80cm.

Prezo: 1,20 USD

MI ESTU PATRINO

1990. 20p. 18,20 × 20,50cm.

Prezo: 1,20 USD

NEĜA INFANO

1985 (dua eld.). 36p. 18,20 × 20,80cm.

Prezo: 1,50 USD

NI KUNE LUDU

1990. 20p. 18,20 × 20,60cm.

Prezo: 1,20 USD

ORA BUKCENO

1986. 40p. 18,10 × 20,60cm.

Prezo: 2,50 USD

ORA HAKILO

1983. 28p. 18 × 26cm.

Prezo: 1,30 USD

PESI ELEFANTON

1981. 92p. 18,20 × 20,50cm.

Prezo: 3,30 USD

PESI ELEFANTON

1994 (nova eld.). 20p. 21,70 × 18,50cm.

Prezo: 2,50 USD

PLAŬ! PLAŬ!

1985. 56p. 18,10 × 20,60cm.

Prezo: 2,50 USD

RAKONTO PRI SIMA GUANG

1994. 20p. 21,70 × 18,50cm.

Prezo: 2,50 USD

SENMORTIGAJ FRUKTOJ

1984. 63p. 18,10 × 20,50cm.

Prezo: 2,50 USD

SERĈI INSTRUANTON

1994. 24p. 21,70 × 18,50cm.

Prezo: 3,00 USD

SERĈI PANJON

1983. 24p. 18,70 × 17,20cm.

Prezo: 1,20 USD

SIMIOJ PROVAS ELAKVIGI LA LUNON

1981 (tria eld.). 12p. 20,80 × 25,60cm.

Prezo: 1,20 USD

SONĜO DE ĜENĜEN

1986. 48p. 18,40 × 16,30cm.

Prezo: 1,70 USD

**SUN VUKONG TRIFOJE BATIS SKELE-
TOSPIRITON**

1974. 118p. 17 × 25cm.

Prezo: 4,00 USD

TRANSIRO DE PONTO

1986. 20p. 18,10 × 20,40cm.

Prezo: 1,20 USD

URSETO EKKONIS SIAN ERARON

1988. 20p. 18,10 × 20,60cm.

Prezo: 1,20 USD

VOSTOKONKURSO

1983. 12p. 18,10 × 20,80cm.

Prezo: 1,00 USD

MENDO

Al: El Popola Ĉinio
P. O. Kesto 77
CN-100037 Beijing
Ĉinio

De: EPĈ-kodo: _____
S-ro/S-ino: _____
Adreso: _____

Dato: _____

Kvanto	Priskribo	Prezo (USD)	Sumo
	Libroj: (bonvolu indiki titolon)		
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
Sumo de la mendo		
<input type="checkbox"/> Bv. sendi registrite (po 2 USD por ĉiu aparta sendaĵo)		
<input type="checkbox"/> Bv. sendi aerpoŝte (25% de ĉiuj prezroj, sed minimume 1 USD)		
TOTALA SUMO:			

Mi jam sendis al vi la pagon per monbiletoj mia UEA-konto internaciaj respondkuponoj.

Subskribo: _____

Aprobis: _____	Fakturn-ro: _____	Plenumis: _____
Konto: _____	Dato: _____	

MENDO

ALL El Lopez Camp
P.O. Box 77
CN-10007 Bogotá
Colombia

Item	Description	Quantity	Unit Price	Total Price
1	Libro: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000
2	NOTA: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000
3	NOTA: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000
4	NOTA: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000
5	NOTA: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000
6	NOTA: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000
7	NOTA: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000
8	NOTA: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000
9	NOTA: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000
10	NOTA: (donde se encuentra el programa de actividades)	1	1.500.000	1.500.000

El precio de la mercancía es de \$ 15.000.000.
 El precio incluye el IVA.
 El precio excluye el IVA.


El precio de la mercancía es de \$ 15.000.000.
El precio incluye el IVA.
El precio excluye el IVA.

El precio de la mercancía es de \$ 15.000.000.
El precio incluye el IVA.
El precio excluye el IVA.



"Kreado de la mondo"

"En la pratempo"



Majstro Padmasalbhava



La grava urbo Lanzhou

Teksto de BING CHUAN

Fotoj de HAN HONG

FORLASINTE Tianshui, mi daŭrigis mian vojaĝon nordokcidenten. Mi veturis 350 km kaj atingis Lanzhou, ĉefurbon de Gansu-provinco.

En la antikveco Lanzhou nomiĝis Jincheng (Ĝinĉeng). Ĝi estis grava loko sur la Silka Vojo. La fama antikva Jincheng-pramejo situis proksime de Lanzhou. Favorate de la pramejo, Lanzhou fariĝis grava staplejo de komercaĵoj en nordokcidenta Ĉinio antaŭ 2 000 jaroj. Okcident-aziaj nacimalplimultanoj tie ŝanĝis siajn ĉevalojn kontraŭ teo kaj aliaj vivbezonaĵoj. Eĉ en la 19-a jc tie ankoraŭ prosperis komercado per teo. Grandkvanta teo de la loko vendiĝis en Xinjiang (Ŝingjang), Tibeto kaj Interna Mongolio.

Tamen pro geografia situo Lanzhou ĉiam ligiĝis kun dezerteco kaj izoliteco en la homa imago. Eĉ antaŭ la ĉi-foja vizito mi ne sciis, kiom prosperas Lanzhou. Atinginte ĝin, mi ekkonis ĝian pozicion en la

fervoja kaj ŝosea retoj kaj ĝian novan fizionomion de grava industria urbo en nordokcidenta Ĉinio.

NOVA FIZIONOMIO DE LA ANTIKVA URBO

Lanzhou, ĉirkaŭita de montoj, sidas en longa valo kaj ĝin trafluas la Flava Rivero. Ĝiaj ĉefaj stratoj estas larĝaj. Ambaŭflanke de la stratoj aromas florbedoj, kies balustradoj surhavas ferajn kameleojn, elefantojn, ĉevalojn k.a.

Surstrate de Lanzhou mi vidis multe da altaj domoj starantaj unu apud alia. La bele dekoraciitaj magazenoj forte impresis per vigleco de tiu urbo en la okcidenta parto de Ĉinio. Ambaŭflanke de la stratoj estas novaj loĝdomoj. Ili distingiĝas per tio, ke ili plejparte estas tegitaj per kaheloj. La alia pejzaĝo de la urbo estas strat-telefonbudoj bele ornamitaj. En ĝi estas tre facila komunikado, ĉu kun aliaj lokoj de Ĉinio, ĉu kun aliaj landoj.

En Lanzhou kreskas multe da arboj ombroriĉaj kaj prosperas so-

froj, emblemo de la urbo. Lokanoj diris al mi, ke antaŭe la tieaj montoj estis kalvaj. En la pasintaj 30 jaroj la tieaj loĝantoj arbarizis 800 hektarojn da kalvaj montoj, kulturis 80 hektarojn da gazonoj kaj verdigis pli ol 300 km da stratoj. Vespere oni senĝene pasumas en promenejoj aŭ ludas ŝakon en ĝardenoj.


BONODORAJ MELONOJ KAJ ALIAJ FRUKTOJ

Aŭtune ĉie en Lanzhou bonodoras melonoj kaj aliaj fruktoj. Preskaŭ sur ĉiu strato vidiĝas provizoraj budoj de vinberoj, pomoj, piroj, granatoj, melonoj k.a.

Iutage, post vespermanĝo mi kaj mia amiko promenis surstrate kaj haltis antaŭ budo de fruktoj. Sub la brilaj gaslampoj vidiĝis multe da melon-tranĉaĵoj. Mia amiko diris al mi, ke en Lanzhou antaŭ ol aĉeti melonon, estas permesate gustumi ĝin kaj tiuj melonaj pecoj estas por gustumado far klientoj. Mi do sidiĝis por gustumi. La melono estis tre dolĉa kaj la vendanto ege afabla. Pro tio mi ne povis ne aĉeti. Momenton poste, mi ekbabilis kun li, mangante melonon. De li mi informiĝis multe pri Lanzhou-aj melonoj kaj aliaj fruktoj.

Lanzhou situas malproksime de maro. Tie regas musona kontinenta klimato. La jara pluvokvanto estas malgranda kaj sunbrilaj tagoj multaj. La temperatura diferenco inter tago kaj nokto estas granda. Ĉio ĉi tio tre utilas al la sukera akumuliĝo en melonoj kaj aliaj fruktoj. Kaj plie, la tieaj kamparanoj estas spertaj en kultivado. Sekve, la melonoj kaj aliaj fruktoj de Lanzhou famiĝas en- kaj eksterlande. Ĉiujare, de frua somero oni vendas abrikotojn,

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO



prunojn kaj akvomelonojn. En septembro vendiĝas pomoj, piroj, vinberoj, granatoj, jujuboj, Lanzhou-aj melonoj kaj aliaj. En Lanzhou estas pli ol 20 specioj da piroj. Eĉ en frosta vintro tie vendiĝas diversaj fruktoj.

Kial Lanzhou abundas je fruktoj? Tio havas ian rilaton kun la Silka Vojo. Vinberoj, granatoj kaj akvomelonoj enkondukiĝis en Lanzhou per la vojo el la Centra Azio kaj Okcidenta Azio. Ne nur en la antikveco, sed ankaŭ en la nuna tempo en Lanzhou troviĝas novaj specioj de fruktoj enkondukitaj de eksterlande kaj aplikiĝas alilandaj metodoj kulturi fruktarojn. Oni diris, ke la Lanzhou-a melono ja devenis de Usono. En 1944, kiam la usona vicprezidanto Wallace vizitis Ĉinion, li postlasis en Lanzhou semojn de dolĉa melono. Poste dolĉaj melonoj enradikiĝis en Lanzhou kaj transformiĝis en novan specion, t.e., Lanzhou-an melonon.

NOVA INDUSTRIA URBO

Lanzhou havas historion de pli ol 2 000 jaroj, tamen ĝi estas nur pli-ol-40-jara, kiel nova industria urbo.

Petrol-kemia industrio en Lanzhou estas plej forta. La Lanzhou-a Rafinejo, Lanzhou-a Kemi-industria Kompanio kaj aliaj grandaj entreprenoj troviĝas en Xigu- (Ŝjigu)-distrikto de la urbo. Tial Xigu fariĝis industria distrikto de la urbo.

Xigu-distrikto distancas de la urbocentro je 25 km. Sur la larĝaj stratoj cirkulas multaj veturiloj, kies granda parto estas kamionoj. Mi vizitis la Lanzhou-an Rafinejon. Tie mi vidis diversajn tubojn, per kiuj interkomunikiĝas ĉiuj laborejoj kaj rafin-turoj. Tie gigantaj cisternoj staras en bona ordo. Inter la turoj kaj cisternoj estas gazonoj kaj florbedoj.

La Lanzhou-a Rafinejo estas la plej frua nafto-prilaborejo de Ĉinio. En 1958, kiam ĝi komencis produktadon, ĝi estis simpla entrepreno pri rafinado, sed nun ĝi estas sinteza entrepreno pri kemi-industrio, mekanikaj instrumentoj,



En regadejo de longdistanca telefonio

Foto de **WANG YICHUAN**

premujoj, projektado kaj muntado. Ĝia jara prilabor-povo estas 5 milionoj da tunoj da nafto. Ĝi estas la plej granda rafinejo en okcidenta Ĉinio.


La Lanzhou-a Kemi-industria Traktado de malpura akvo

Kompanio, proksime de la Lanzhou-a Rafinejo, estas granda entrepreno konstruita en la 50-aj jaroj. Komence ĝi enkondukis el Sovetunio ekipaĵojn por kemi-sterka kaj kaŭĉuka fabrikoj kaj






Strato laŭ rivero



Frukto-budoj





En pogranda vendejo



Lanzhou

poste havis ekipaĵojn por butadiena stirena kaŭĉuko kaj pro tio Ĉinio ekhavis sian propran sintezan kaŭĉukon. Post tio ĝi starigis novajn instalaĵojn kaj efektivigis transiron de gren-olea kemi-industrio al la petrolo. Surbaze de tio, post la 80-aj jaroj ĝi starigis nafto-distilan instalaĵon por pli ol 600 000 tunoj da nafto en la jaro kaj etilenan instalaĵon de la internacia nivelo de la 80-aj jaroj. Dank' al tio, ĝia jara produktopovo de etileno atingis 80 000 tunojn.

La supre menciitaj 2 grandaj entreprenoj kaj iliaj najbaraj fabrikoj grandaj kaj malgrandaj vidigas la brilan perspektivon kaj latentajn fortojn de industrio en la okcidenta parto de Ĉinio.

POR PLIBELIGI LANZHOU

Moderna industrio disvolvis Lanzhou kaj samtempe kaŭzis al ĝi seriozan polucion.

En 1977 la polucio en la centro de Lanzhou fariĝis tre serioza kaj lanzhou-anoj do metis mediprotekton en la tagordon.

S-ro Yu Xionghou (Ju Ŝjonghoŭ), estro de la urba mediprotekta buroo, konigis min pri la kaŭzoj de

la polucio. “Ambaŭflanke de la urbo estas montoj, kaj Lanzhou estas tipa ruband-forma urbo. Limigite de la topografio, la tiea malpura aero tre malfacile disfluas, kaj plie, pluvokvanto estas malgranda, vaporiga kvanto granda kaj la loĝantaro kreskas rapide. Precipe en vintro karbobruligo pligravigas la polucion.”

Kontraŭ tio la magistrato alprenis serion da rimedoj, kiaj transformado de fornoj por la popola vivo kaj industrio, kolektiva hejtado, malfunkciigo kaj translokado de grave poluantaj fabrikoj kaj sinteza traktado de ellasitaj substancoj de iuj grandaj entreprenoj. Tiuj rimedoj donis bonan efikon. En la lastaj dek jaroj la industria produktovaloro de la urbo kreskis jaro post jaro kaj la loka ekonomio disvolviĝis kontinue, dum la media kvalito ne malboniĝis kaj la akva kvalito de la parto de la Flava Rivero en Lanzhou atingis la normojn difinitajn de la ŝtato.


S-ro Yu diris al mi ankaŭ, ke por akceli pliboniĝon de la urba medio kaj sinteze trakti la median polucion oni efektivigas nun


la “Ĉiel-blugan planon” kun arbarizado kaj livero de gaso, sunenergio kaj karboj kiel la ĉefa enhavo. Por tio la urbo investis 1.45 miliardojn da juanoj al gas-tuba sistemo, unuigita hejtado k.a.

Samtempe kun tio, ankaŭ la grandaj entreprenoj rapidigas siajn paŝojn por plibonigo de la medio. Proksime de la Lanzhou-a Rafinejo estas bela surakva parko kun naĝejo de 10 000 kvadrataj metroj kaj artefarita lago de 35 000 kvadrataj metroj. Sur la lago remas boatoj. Kioskoj, pavilonoj, koridoroj kaj pagodoj dissemiĝas en la arbaro, floroj aromas en la tuta parko. Sed sciu, ke la klara akvo de la lago estas traktita akvo ellasita de la Lanzhou-a Rafinejo.

Dank' al pliboniĝo de la medio, sovaĝaj anseroj kaj aliaj birdoj, ne viditaj de multaj jaroj en la urbo, reflugis al la Flava Rivero. Tie vidiĝis ankaŭ mevoj, viditaj neniam antaŭe sur la rivero. Kvankam oni ankoraŭ devas fari multon por la media protektado, tamen en Lanzhou la media polucio estas fundamente bremsita. Lanzhou fariĝos pli bela kaj pli pura urbo. ■

Skulptaĵo en Lanzhou





Turistoj remas sur iam poluita akvo en parko.

Lanzhou-anoj en matena korpo-ekzercado





Kontrolo de polucio



En regadejo de mikroaparatoj de la Lanzhou-a Kemiindustria Kompanio

La Lanzhou-a Rafinejo



ESTAS multaj antikvaj urboj en Ĉinio, el kiuj nur kelkaj petis UN pri la titolo "monda kultura restaĵo". La antikva urbo Dayan enviciĝis inter tiuj kelkaj urboj ne nur pro sia 800-jara historio, sed ankaŭ pro sia originaleco.


Situanta sur altebenaĵo en sudokcidenta Ĉinio, Dayan estas ĉirkaŭita de verdaj montaroj, kun Yulong-neĝmonto en malproksimo. Fakte la urbo estis konstruita sur milda deklivo de montaro. Iuj diras, ke starante sur la plej alta loko de la urbo oni havas panoraman vidon al la altebenaĵo. Tamen nur malmultaj turistoj povas atingi tiun lokon, ĉar la zigzagaj vojetoj de la urbocentro radias al diversaj flankoj. Oni iras tie kvazaŭ en labirinto, kaj ofte okazas, ke oni revenas al sia deirpunkto.

La vojetoj estas pavimitaj per koloraj ŝtonoj. Post multjara irado la vojoj estis poluritaj. La centro de la urbo nomata Sifang estas la startpunkto de multaj vojetoj kaj la plej movoplena loko de la urbo. Sifang en la ĉina lingvo signifas "kvadrata", do ĉirkaŭ la kvadrato viĉiĝas butikoj kaj provizoraj budoj, kiuj vendas manĝaĵojn, vestojn kaj aliajn vivbezonaĵojn. Budo de kolieroj allogas multajn knabinojn. La kolieroj estas faritaj el arĝento, ligno kaj plejparte el ŝtonoj diverskoloraj. Tiuj krudaj metiartaĵoj venis el Tibeto. Historie Dayan estis nepra pasejo al Tibeto por komercistoj, tial la urbo fariĝis unu el la gravaj komercaj centroj en sudokcidenta Ĉinio. La lokanoj nomas la vojon "antikva vojo de teo kaj ĉevaloj", eble ĉar oni komercis siatempe ĉefe per ĉevaloj, teo kaj salo.

Se vi iras de Sifang laŭ ajna vojeto, vi sentas vin kvazaŭ en akvolando de sudorienta Ĉinio: akvo fluanta laŭ la vojeto zigzagas en la urbo. Ĉe la loĝdomoj prezentiĝas originala pejzaĝo de akva urbo sur altebenaĵo: salikaj branĉoj balanciĝas en venteto, blankaj anasoj naĝas sur klara akvo, junulino kun ruĝa sitelo descendas laŭ ŝtonaj ŝtupoj kaj kliniĝas por preni akvon...

Kie estas akvo, tie estas ponto. En Dayan la pontoj en diversaj formoj estas elegantaj. Oni vidas jen arkan ponton jen platan ŝtonan ponton, kiuj kunfandiĝas kun la loĝdomoj, fluanta akvo kaj butikoj en harmonia tuto, kio formas pitoreskan pejzaĝon de la urbo.

Loĝantoj de Dayan havas la tradicion de komercado. Jen ĉe la stratoj oni kutimas loĝi en la dua etaĝo kaj la unua etaĝo servas kiel butikoj por vendi lokajn produktaĵojn — vestoj el vaksinturita ŝtofo aŭ metiartaĵoj, aŭ servas kiel gastejo, restoracio, vesto-prilaborejo aŭ toŭfu-produktejo. La domoj estas malnovaj, kaj estas



En strateto de la antikva urbo

HU YUN:

Akva urbo sur altebenaĵo


trairebla kiel pordo la larĝa fasado, kies klapojn oni starigas nur en vespero. La domoj kun mallarĝa fasado estas profundaj kaj iom malhelaj interne.

Dayan-anoj ne nur lerte komercas, sed ankaŭ diligente laboras. Plejparto de la 4 200 familioj en la urbo apartenas al Naŝi-nacio, nacimalplimulto kun klereco kaj kultura historio. Dongba-lingvon, kiu estas propra al ili, fakuloj nomas "vivanta hieroglifo". La naŝi-aj virinoj portas ŝalon el ŝafelo. La ŝalo estas delikate ornamita per du grandaj kaj sep etaj rondaj figuroj, kaj la alternaj blanka kaj nigra koloroj sur ĝi simbolas la sunon, lunon, stelojn, ĉielon kaj teron, adoratajn de la prapatroj de la naŝi-oj. Aliaj diris, ke la virinoj portas ŝalon, kio montras, ke ili multe kaj pene laboras sub la luno kaj steloj. Sur la stratoj de Dayan la virinoj portas ne nur ŝalon, sed ankaŭ bambuan korbon kun diversaj objektoj. La vivo donas al la virinoj pezan taskon, kiu ja bezonas ilian diligentecon. Tamen la serena rido kaj babilado de la virinoj montras ilian defion al la ŝarĝo de laboro. Ĉu tio ne estas karakterizaĵo de la antikva urbo Dayan? ■

POŝTO KAJ TELEKOMUNIKO EN LA NACIMALPLIMULTAJ REGIONOJ

de WEI GUOXIONG

En centralo de program-regataj telefonoj



EN la mezo de la 80-aj jaroj iu alilanda komercisto venis al Hohhot, ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio de Ĉinio, por negoca traktado. Li telefonis al sia lando, sed malsukcesis en konektado kaj foriris malĝoje. De longa tempo la postginteco de telekomunikado kaj malmulteco de informoj malhelpis la socian kaj ekonomian disvolviĝon de la nacimalplimultaj regionoj.

Post dekjara penado la poŝta kaj telekomunika afero de Hohhot rimarkinde progresis. En 1989 ekfunkciis en ĝi 12 000 program-regataj telefon-lineoj. Poste ekfunkciis ankaŭ radio- kaj fotokablo-komunikaj sistemoj.

Eĉ en la izolita arbara regiono de la Interna Mongolio evenkoj, kiuj vivis tradicie de ĉasado, povas telefoni al kiu ajn loko en- kaj eksterlande.

Kiel la Interna Mongolio, ankaŭ la Xinjiang-(Ŝingĵang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, la Ningxia(Ningŝja)-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, la Guangxi(Gŭangŝji)-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono kaj la Tibeta Aŭtonoma Regiono adiaŭis la postgintecon kaj fermitecon de komunikado.

Kaŭze de historiaj kaj geografiaj faktoroj, la poŝta kaj telekomunika afero de la nacimalplimultaj regionoj de Ĉinio estis malforta kaj disvolviĝis malrapide. Ni prenu la Xinjiang-an Ujguran Aŭtonoman Regionon kiel ekzemplon. En 1978 la regiono havis nur 13 longdistancajn telefon-lineojn, t.e. ĉiu miliono da homoj disponas unu. Fine de la 80-aj jaroj, en la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono oni kontaktiĝis kun la ekstera mondo nur per 2 mikroondaj lineoj, instalitaj en la 60-70-aj jaroj. Niaj alilandaj amikoj, kiuj vojaĝis en Guilin de Guangxi, certe memoras la pitoreskejon Yangshuo. Sed neniu imagis, ke en la fama turisma loko oni uzis manmanipulatan telefonon eĉ fine de la 80-aj jaroj.

Kun la disvolviĝo de ekonomia konstruado en la

okcidenta parto de Ĉinio, la poŝta kaj telekomunika afero de la ĉinaj nacimalplimultaj regionoj suriris disvolviĝan vojon. En la lastaj jaroj la ĉina registaro investis pli multe por la poŝta kaj telekomunika konstruado en tiuj regionoj kaj plirapidigis ties poŝtan kaj telekomunan konstruadon por akceli la socian kaj ekonomian disvolviĝon en la regionoj. En 1990-1995 koncerna departemento kolektis kapitalon, konstruis 6 fotokablajn lineojn kun totala longo de ĉ. 10 000 km kaj identigis la telekomunan reton de la Interna Mongolio, Ningxia, Guangxi kaj Xinĵiang kun tiu de la tuta lando.

En 1989-1995 la Interna Mongolio investis 4.4 miliardojn da juanoj (8.33 juanoj egalas 1 USD), instalis 870 000 ŝanĝilojn de program-regataj telefonoj kaj konstruis 10 000-kilometran fotokablan lineon, 1 400-kilometran cifere-mikroondan lineon kaj 14 satelitajn terstaciojn. En la regiono servas telekomunika reto, telefonŝanĝa programigo kaj longdistanca cifere-transigo. Kaj la 84 gubernioj havas radio-vokan servon.


Senĉesa pliboniĝo de la telekomunikaj kondiĉoj akcelis la disvolviĝon de la Interna Mongolio. Laŭ statistiko, fine de 1994 en la regiono estis 926 entreprenoj, investitaj de Ĉinio mem aŭ kune de Ĉinio kaj aliaj landoj. La Interna Mongolio starigis komercan rilaton kun 82 landoj kaj regionoj kaj ekonomian kaj komercan kunlaboron kun pli ol 900 gubernioj kaj urboj de 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio.

Konsidere la trajtojn de la nacimalplimultaj regionoj, la ĉina registaro pligrandigas sian investon kaj helpas ilin laŭ iliaj kondiĉoj. Laŭ la geografia situo de Tibeto kaj Xinĵiang, la registaro konstruigos ĉefe satelitan telekomunan reton en ili.

En 1990-1995 la fikskapitala investo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono por la telekomunika reto atingis 482 milionojn da juanoj, dekoble pli multe ol la totala investo por poŝto kaj telekomuniko donita en la pasintaj 5 jaroj tuj antaŭ 1990, funkciis 73 satelitaj terstacioj kaj konstruiĝis satelita telekomunika reto, la plej granda en la lando. En Tibeto ĉiuj distriktoj, urboj kaj gubernioj havas program-regatajn telefonojn kaj 80% de la gubernioj estas ampleksitaj de la aŭtomata longdistanca telefona reto de Ĉinio. Telekomunikaj fotokabloj servas inter Lhasa kaj Xigaze kaj inter Lhasa kaj Nanshan kaj la sistemo de porteblaj telefonoj — en ĉiuj distriktoj kaj urboj.

En la lastaj jaroj multe kreskis la telekomunika servo donita de la tibeta poŝta kaj telekomunika departemento. La nombro de telefon-uzantoj jam atingis 32 000. Nun en Tibeto oni servas per radio-vokado, portebla telefono, magnetkarta telefono, laŭgrupa konekto k.a., kio kontentigas la bezonon de diversaj socitavoloj.

La eŭraziaj fotokabloj trapasas Xinĵiang de or-



Terstacio de telekomunika satelito en Tibeto

iente okcidenten. La fotokabloj, la cifere-mikroondaj lineoj kaj konstruataj fotokabloj inter la suda kaj norda partoj de Xinĵiang formas krucan skeleton. La 6 grandaj kaj aro da malgrandaj satelitaj terstacioj kun Urumĉi kiel la centro formas satelitan komunikan reton interne de la regiono. La jam instalita reto de program-regata telefonio kun 800 000 lineoj rapide pligrandiĝas, ĉ. 10 000-kilometra telekomunika fotokablo etendiĝas al gubernioj, 70% de la gubernioj havas fotokablan lineon, kaj komputiko estas vaste uzata en poŝta kaj telekomunika kampo.

En 1990-1995 la nombro de telefonoj konektataj de la centraloj de la 5 aŭtonomaj regionoj kreskis de 699 000 al 3.36 milionoj, kaj la nombro de longdistancaj telefon-lineoj kreskis je 53 000, 9.3-oble pli multe ol tiu en 1990.

La tekniko de telekomunika reto transiris de man-manipulado al aŭtomatigo. Sur tiu bazo ĝi transsaltas de simula tekniko al cifera. En Guangxi, Ningxia kaj la Interna Mongolio ĉiuj urboj kaj gubernioj komunikas rekte per telefona reto, internacia kaj enlanda, kun program-regataj ŝanĝiloj kaj cifere-transigiloj. Ĉiuj urboj kaj gubernioj en Tibeto kaj Xinĵiang komunikas per program-regata telefona ŝanĝilo.

En la nacimalplimultaj regionoj diversa telekomunikado pluapasa populariĝis kaj telefona komunikado rapide disvolviĝis. La telefona populariĝa procentaĵo de la 5 aŭtonomaj regionoj kreskis averaĝe je 2.3% en 1990-1995.

La daten-komunikado, servanta rekte al la nacia ekonomio per informado, profundiĝas en la nacimalplimultaj regionoj.

La modernaj poŝto kaj telekomuniko ligas la nacimalplimultajn regionojn de Ĉinio kun la mondo. ■



En legoĉambro de fabriko

FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO

La Publika Lego-Asocio de Pekino

de SUN AIJUN

Legado estas nemankigebla por la vivo de homoj. Kiel oni povas malmulte elspezi por multe legi en Ĉinio, lando kun nealta vivnivelo? Ĉi-sube ni konigos al vi la Publikan Lego-Asocion de Pekino.

La Red.

VIDANTE sian edzon legi sur sofo post vespermanĝo, Pan Shu'e demandis lin kun miro:

“Ĉu vi ne ludos maĝangon ĉi-vespere?!”

Pan Shu'e kaj ŝia edzo Wang Yuguo (Ŭang Jugūo) loĝas en antaŭurbo de Pekino. Ŝi funkciigas barbirejon kaj ŝia edzo laboras kiel taksisto. Ili diligente laboras kaj multe enspezas. Ili ambaŭ estis maĝango-manuuloj. Antaŭ 2 jaroj, ludante maĝangon, ili konatiĝis unu kun la alia. Poste ili geedziĝis. Preskaŭ ĉiuvespere tiu juna paro ludis maĝangon, kelkfoje eĉ hazardludis kaj perdis la enspezaron. Pro tio ili ofte kverelis inter si.

Tiuvespere, anstataŭ respondi al sia edzino, Wang pasigis al ŝi gazeton. En ĝi legeblas jena rakonto:

Iu viro malgajnis hazardludon. Por pagi la ŝuldojn li ŝtelis, rabis, kaj eĉ donis siajn edzinon kaj filon al la gajninto kiel garantiaĵon. Pro tio lia edzino sin mortigis kaj li enprizoniĝis.

Leginte tiun ĉi artikolon, Pan longe silentis. Ŝi rimarkis sur la kovrilo de la gazeto grandan ruĝan stampon kun la vortoj “Publika Lego-Asocio”. Wang diris al ŝi, ke lia amiko proponis al li la gazeton “Familio”. En la asocio oni povas pruntepreni kelkdek specojn da periodaĵoj kaj oni kotizas por la asocio je 3 juanoj ĉiumonate.

Je tio Pan diris al sia edzo:

“Bona afero! Ni aliĝu al la asocio!”

“Jen kion mi volas diri al vi,” voĉo de la edzo.

Ekde tiam la junaj geedzoj ne plu hazardludis maĝangon. Post laboro ili legis ĵurnalojn kaj gazetojn, kio iom post iom fariĝis plej ŝatata de ili. Kaj la najbaroj neniam poste aŭdis ludon de maĝango kaj kverelon inter la geedzoj.

Eble niaj legantoj demandus: “Kia estas la Publika Lego-Asocio?” “Ĉu ĝi havas tiel fortan altiron?” Similajn demandojn faris ankaŭ mi dum mia intervjuo. Ne nur la junaj geedzoj, sed ankaŭ aliaj intervjuitoj unuvoĉe respondis al mi: “Estas bona la Publika Lego-Asocio!”

En 1988 la Pekina Virina Federacio starigis la Publikan Lego-Asocion. Laboranto de la federacio informis, ke dank' al la ekonomia prosperiĝo de Ĉinio en 1988, multe pliboniĝis la materiaj vivkondiĉoj de la popolanoj. Sekve de tio, ĉinoj pli kaj pli soifis la kulturen vivon, sed la kulturaj instalaĵoj ne povis kontentigi ilian bezonon. Precipe en la kamparo oni havis malfacilon por aĉeti legaĵojn kaj pruntepreni librojn. Rimarkinte tion, laborantoj de la Pekina Virina Federacio abonis per sia propra mono kelkdek specojn da periodaĵoj kaj starigis la Publikan Lego-Asocion. Nun ĝi havas 18 filiojn, 1 200 staciojn kaj pli ol 60 000 membrojn.

Maljunulino Jing Runzhi (Ĝing Ĵunĝi), estro de la virina komitato de loĝkvartalo, volontule servis 8 jarojn en stacio de la asocio. Ŝi diris: "Komence volis aliĝi al la asocio nur unu loĝanto en nia loĝkvartalo. Do, mi vizitis ĉiujn aliajn loĝantojn, por ke ili aliĝu al la asocio. Nun nia stacio havas pli ol 50 membrojn." Krome, ŝi ankaŭ pagis kotizon por aliaj, kolektis por ili sciojn pri la vivo kaj prezentis al ili gazetojn. En iu stacio de Tongxian(Tongŝjan)-gubernio, Pekino, mi vidis, ke oni vicigas por pruntepreni legaĵojn. Kun novaj gazetoj en la mano iuj ĝoje diris al mi: "Estas tre oportune por ni pruntepreni legaĵojn en la vilaĝo."

Nun en la Publika Lego-Asocio laboras pli ol 2 000 volontuloj, kia Jing. Ĉiumonate ili akurate distribuas pli ol 60 000 ekzemplerojn da gazetoj al siaj membroj. En la pasintaj 8 jaroj la asocio varbis ĉ. 400 000 membrojn kaj distribuis 4.2 milionojn da ekzempleroj da gazetoj.

Teng Guoyu (Teng Ĝoju), kiu laboras en malgranda fabriko de vilaĝo en la antaŭurbo, estis analfabeto-kampanano. Ŝi havas apartan inklinon al la asocio. Dum 3 jaroj post kiam ŝi aliĝis al la asocio, ŝia filino, kiu lernis en elementa lernejo, legis al ŝi kaj ŝia blinda edzo pli ol cent ekzemplerojn da gazetoj. Ŝi diris: "Mi prunteprenis legaĵojn el la stacio, mia filino legis, dum mia edzo kaj mi aŭskultis. Tio ne nur pligrandigis nian konadon pri la ekstera mondo, sed ankaŭ malstreĉis min pro mastrumado."

En la stacio de Fancun-vilaĝo en la antaŭurbo mi vidis, ke la vilaĝo kun 2 000 anoj disponigas grandan ĉambron kiel legoĉambron, en kiu vico da librobretoj staras ĉe muro, kaj sur ili estas diversaj periodaĵoj. La estro de la vilaĝa virina organizo informis al mi: "En nia vilaĝo estas nemalmultaj laborantoj el aliaj lokoj. Post la fondiĝo de la stacio ili kune legis en ĝi. Dank' al tio, iagrade pliboniĝis la publika sekureco de la vilaĝo kaj nemalmultaj el ili fariĝis helpemaj."

Respondeculoj de la diversnivelaĵoj virinaj federacioj faris laŭeble pli da laboroj por bone funkciigi la asocion. Ili ŝarĝis sin per distribuado, direktado de legado kaj aliaj servoj. Liu Shuqin (Liŭ Ŝuĉin), unu el la fondintoj de la asocio, diris al mi: "Mi kaj miaj koleginoj respondecas ne nur pri distribuado, sed ankaŭ pri dekkelk-foja transportado de dekmiilo da ekzempleroj en pakoj, ĉiu pezas pli ol 10 kg. Tio multe lacigas nin." Je tio ŝi ekridetis: "Sed tion ni neniam timas. Ĝojindas, ke nian penadon rekompencis la aprobo de la popolanoj kaj neatendita sukceso."


La organizantoj de la asocio donas grandan atenton al direktado de legado. Ili rekomendas gazetojn legindajn kaj taŭgajn por legantoj, ĉiamaniere plimultigas legadon kaj organizas enhavoriĉajn aktivadojn, ekz. peti rilatajn kontribuadojn, okazigi konkurson de prelego kaj doni familiajn sciojn.

Oni devas pagi 50-60 juanojn ĉiujare por aboni revuon kaj en la asocio — 36 juanojn por legi pli-ol-50-specajn revuojn. Iu asocianino konkludis: "Por ni la asocio estas favora kaj la legaĵoj — instruaj. Ne nur ni, sed ankaŭ niaj infanoj multe ĝuas legadon."

Jen kial pli kaj pli multaj aliĝis al la asocio. ■

Interŝanĝo de legaĵoj





Puyi kaj lia edzino Wanrong en la palaco

MEZE de la 19-a jarcento, fotografio iom post iom perfektigis en eŭropaj kaj amerikaj landoj, iuj fotografistoj enkondukis ĝin en Ĉinion. Kvankam en Ĉinio ekzistis amatoroj de fotografio, tamen ĝi ne estis disvastigita rapide pro la fermita socio kaj postĝinta ekonomio. Rigardante fotografion kiel herezaĵon, la regantoj de Qing(-Ĉing)-dinastio ĉiarimede ĝin forpuŝis. Ili eĉ opiniis, ke rigardi la nesupereblan imperiestron kaj liajn edzinojn tra la lenso estas ofendo al ili. En la komenco de la kuranta jarcento fotografio disvastiĝis iom post iom. El la jenaj rakontoj oni povas vidi la historian profilon de disvastigo de fotografio en Ĉinio.

LA UNUA FOTOGRAFISTO EN LA PALACO

La unua fotografisto en la Imperiestra Palaco estis Zhen Fei, la plej ŝatata kromedzino de imperiestro Guangxu (Güangŝju) (1875-1908 sur trono). Zhen Fei, nature vigla, aspekte serioza kaj bela, interesiĝis speciale pri nova afero. En 1894, spite al severaj tabuoj de la palaco, ŝi ŝtele aĉetis fotografilon kaj ĝin absorbiĝe studis. Poste ŝi ne nur fotis la imperiestron, sed ankaŭ lernigis siajn servistojn uzi

LIN JING:

Fotografio en la Imperiestra Palaco

la fotografilon kaj lasis ilin foti ŝin en diversaj vestoj kaj pozoj. Sed la feliĉa tempo daŭris ne longe, la regantoj de la palaco tion eksciis, ŝi estis punita kaj eĉ ŝiaj eŭnukoj ekzilitaj. Kun granda manio al fotografado, ŝi komisiis funkciigi fotografejon proksime de la palaco per ŝia ŝparmono. Post nelonge la afero malkaŝiĝis kaj oni ŝin denunciis, ŝi estis severe punita refoje.

Se oni dirus, ke Zhen Fei estis punita sole pro fotografado, tio ne estus fakto. En la historio Zhen Fei, supergenia, estis enviita de la imperiestra patrino Cixi (Ciŝji) (1835-1908); Zhen Fei subtenis la Reformadon de 1890 far imperiestro Guangxu, kaj pro tio, Cixi, despota imperiestra patrino, malŝatis ŝin ĝis la ostoj. En 1898, kiam imperiismaj agresantoj invadis Ĉinion, Cixi ordonis dronigi Zhen Fei, 25-jaran, en la pŭto, antaŭ ol fuĝi el la palaco. Nun restis nur unu foto de Zhen Fei en la palaco.

ANKAŬ CIXI INTERESIĜIS PRI FOTADO

Imperiestra patrino Cixi, kiel efektiva reganto en la lasta periodo de Qing-dinastio, iam kruele sufokis la fotografan aktivadon en la palaco. Sed kiam ŝi vidis la ĵus ricevitan kolorigitan familian foton de la rusa caro Nikolaj la Dua kaj lia edzino, ŝi ekhavis kaprican ideon kaj ekinteresiĝis pri fotografado. Ŝi

ordonis starigi budon kun dekoracia ekrano kiel la fono en la Somera Palaco kaj foti sin. Ĉar Cixi tabuis la sunombrojn sur la vizaĝo en la foto, la imperiestra fotografisto, aplikante mildan akordan naturan dispersan lumon, elfaris klaran kaj reliefan foton. La ŝatatajn fotojn li grandigis, kolorigis, kadris kaj pendigis en la dormoĉambro de Cixi. Tio faris sensacion en la kortego.

Oni multe fotis Cixi ŝminkitan. Poste, en la palaco ĉiuj sekvis ŝian ekzemplon. Ne decidis, ke la fotoj de la edzinoj de la imperiestroj superis tiujn de Cixi ĉu en dekoracio ĉu en ŝminko, tial la fotografisto penadis foti ilin plaĉaj, farante kontraston de nigro, blanko kaj grizo kaj manieron de varieco por reliefigi ilin. Ekzemple, la imperiestredzino estis ne tre bela, la fotografisto plenigis la mankon per uzado de blanka fono; la kromedzino de imperiestro Puyi (1909-1912 sur trono) estis bela, kaj per nigra fono la fotografisto montris ŝian temperamenton kvietan kaj seriozan.

HISTORIA POSTSIGNO

En 1911 burĝa demokratia revolucio eksplodis en Ĉinio. Februare de 1912, Puyi, la lasta imperiestro,

devigite abdikis la imperiestrecon. Post la abdiko Puyi daŭre loĝis en la palaco 13 jarojn kun la imperiestra titolo. Por sin amuzi, portante fotilon, li kaj liaj edzinoj ofte fotis unu alian en la palaco, ili postlasis multe da fotoj, ĉiu po cent. El la fotoj de Puyi, kiu estis en imperiestra robo, civila aŭ eŭropa vesto, oni povas vidi la postsignon de socia ŝanĝigo; kaj el la fotoj, en kiuj li estis alte staranta sur la tegmento de la palaco, rajdanta sur ĉevalo, akvumanta florojn, luktanta aŭ staranta apud granda germana luphundo, oni povas vidi la animstaton de la abdikita imperiestro. La fotoj kun la imperiestredzino en eŭropaj okulvitroj, flutanta, ventumanta, grimpanta sur monto kaj arbo aŭ biciklanta vidigas ŝian humuron kaj senĝenecon kaj pensigas, ke la disfalo de la feŭda dinastio, en ia senco, liberigis la kromedzinojn korpe kaj anime.

Foje, por sin amuzi, Puyi speciale portis uniformon de generalo de la Respubliko de Ĉinio kaj fotis sin. Informiĝinte pri tio, lia patrino tuj lin venigis, pridemandis kaj riproĉis lin. Puyi malĝoje demetis la uniformon, kiun li portis portempe. Sed la historia okazaĵo estis registrita sur la foto por ĉiam. ■

Zhen Fei



Cixi



Gimnastiko por la gastroentera funkcio

LA gastroentera funkcio rilatas rekte al homa sano kaj vivo. Ĉi-sube ni konigos al vi simplan gimnastikon por la gastroentera funkcio. Longatempa farado utilas al la sanaj homoj kaj iagrade efikas por la suferantoj de kronika malsano en la digesta sistemo.

Faru tiamaniere:









1. Staru kun la brakoj etenditaj antaŭen, manplatoj internen kaj kalkanoj levitaj, kaj kaŭriĝu. Poste stariĝu kaj rektiĝu. Faru tion 10-15 fojojn (Bildo 1).

2. Apogu viajn manojn sur la planko, kun la brakoj streĉitaj, je distanco de la ŝultroj kaj etendu malantaŭen viajn dekstran kaj maldekstran piedojn alterne. Laŭeble alpremu la fleksitan genuon al la brusto. Faru tion po 10-15 fojojn (Bildo 2).

3. Kuŝu sur unu kubuto. Metu la alian manon sur la talion, levu ĝin kaj tenu la pozon por 10-20 sekundoj. Faru tion alterne po 8-10 fojojn (Bildo 3).

4. Kuŝu sur la dekstra flanko de la korpo, kun la kapo apogita sur la dekstra mano, la maldekstra mano streĉita ĉe la brusto, la dekstra gambo fleksita kaj la maldekstra rektigita. Laŭeble movu la lastan dekstren kaj maldekstren. Faru la samon, kuŝante sur la maldekstra flanko. Faru tion po 10-15 fojojn (Bildo 4).

5. Kuŝu surdorse kun la manoj sur la ventro. Ŝveligu la ventron, kiam vi enspiras kaj malŝveligu ĝin, kiam vi elspiras. Malforte premu la ventron per la manoj ĉe elspirado. Faru tion por 1-2 minutoj (Bildo 5).




6. Kuŝu surdorse kun la genuoj kaj gluteoj fleksitaj. Tenu la kruojn per viaj manoj kaj laŭeble alpremu la femurojn al la brusto kaj tenu la pozon por 5-10 sekundoj. Reprenu la originan teniĝon. Malstreĉu vin por 10 sekundoj. Faru tion 8-12 fojojn (Bildo 6).

7. Kuŝu surdorse kun la brakoj ambaŭflanke de la korpo. Fleksu viajn genuojn kaj kunmetu viajn kruojn. Turni ilin dekstren kaj maldekstren. Spiru nature. Faru tion 25-30 fojojn (Bildo 7).

8. Kuŝu surdorse kun la brakoj kaj kruoj rektigitaj. Levu la piedojn vertikale 6-12 fojojn (Bildo 8).

9. Staru kun la brakoj fleksitaj je 90 gradoj kaj manplatoj direktitaj malsupren kaj senmovaj. Levu la piedojn kaj paŝu ĉe la loko. Levu la genuojn laŭeble ĝis la manplatoj. Spiru nature. Faru tion por 30-50 sekundoj (Bildo 9). ■

“Reguloj pri malpermeso de fumado en la publikaj ejoj en Pekino” ekpraktikata de la 15-a de majo 1996



“Nia familio de longe malpermesas fumadon.”

“Nia familio jam komencis malpermesi fumadon.”

Karikaturo de HU MINGLIANG

POR LA SANO DE NASKIPOVAJ VIRINOJ

EN la ĉinaj urboj kaj vilaĝoj ofte vidiĝas servostacioj de naskolimigo por la naskipovaj virinoj. Pri tiuj popolaj organizaĵoj ne mankas kortuŝaj rakontoj. En Yinan-gubernio, Shandong-provinco, estas tia servostacio, kies estrino estas s-ino Li Xiuying (Li Ŝiŭjing). Oni nomas ŝin Franjo Li.

En maja vespero, 1993, iu kampanino estis subite atakita de akuta ventrodoloro kaj interna hemoragio. Oni portis ŝin en la servostacion. Tiam s-ino Li estis turmentata de kolecistito kaj oni faris al ŝi pogutigadon. Aŭskultinte raporton de la deĵoranta kuracisto, ŝi konkludis, ke tio estas rompiĝo de eksterutera gravedeco kaj oni devas fari al ŝi operacion senprokraste. S-ino Li tuj ĉesis ricevi la pogutigadon kaj hastis al la operaciejo. Tiam oni jam ne trovis la sangpremon kaj pulson de la malsanulino. Li Xiuying tuj aranĝis urĝan savadon. Post transfuzo la sangpremo de la malsanulino komencis leviĝi, dume pro akra doloro preskaŭ falis Li Xiuying. Post la doloro ŝi denove eklaboris ĉe la operacia stablo. La kampanino estis savita kaj Li Xiuying malstreĉita. Ŝiaj kolegoj kaj samlokanoj estis kortuŝitaj ĝis larmoj.

Li Xiuying estas 47-jara. Ŝi ekokupis sin je kuracado antaŭ 30 jaroj. Kun operaciaj instrumentoj sur la dorso ŝi postlasis siajn piedsignojn preskaŭ ĉie en la gubernio. Oni jam ne povas kalkuli bone, kiom da malsanuloj ŝi savis. Ŝi oferis sian sangon al akuŝintino, kiu suferis de abunda sangado post akuŝo. Ŝi ankaŭ pagis por malsanaj kampaninoj, kiuj ne havis monon sufiĉan por medikamentoj.

En 1988 Li Xiuying forlasis la oficon de estrino de la obstetrika-akuŝologia fako kaj transprenis la

oficon de estrino de la servostacio. Kvankam la politiko pri naskolimigo praktikiĝis en Ĉinio jam multajn jarojn, tamen la malnova koncepto "pli da filoj, pli da feliĉo" ĉe iuj loĝantoj ankoraŭ ne radikale nuliĝis. La laboro pri naskolimigo estis tre malfacila. Iuj familioj kun multaj infanoj ne povis sin liberigi el malriĉeco. La plurjara praktiko komprenis ŝin, ke la laboro koncernas ne nur efektivigon de la politiko pri naskolimigo, sed ankaŭ proprajn interesojn de la virinoj.

Li Xiuying diris al mi: "Foje, kiam mi vizitis naskipovajn geedzojn, la edzino, operaciita por naskolimigo, verŝis al mi sian ĉagrenon, ke ĉiutage ŝi prenis medikamentojn kaj ankoraŭ multe suferis. Ŝi ne povis fari dommastrumadon nek kamplaboron. Ŝia sufero doloris min. Reveninte al la servostacio, mi studis pri la komplikaĵo kaj sekvaĵo, aperintaj iafoje post naskolimiga operacio, kaj penadis kune kun pli ol 130 laborantoj de nia gubernio por levi la nivelon de profesia laboro. Rezulte de

tio, la komplikaĵo okazas nur al malpli ol 0.02% de la operaciitoj."

Li Xiuying kaj ŝiaj kolegoj disdonis preventilojn kaj faris sekuran naskolimigan operacion al la naskipovaj virinoj, kaj krome, ili ankaŭ energie propagandis naskolimigon, pacience konigis al la naskipovaj geedzoj, kial oni devas praktiki naskolimigon kaj kia estas la rilato inter naskolimigo kaj riĉiĝo. Sekve pli kaj pli da junaj geedzoj memvole alprenis rimedojn por preventado. Ekde 1992 en la servostacio tiaj operacioj evidente malmultis. Li Xiuying kaj ŝiaj kolegoj do ekokupis sin je la san-protekto de generado por la naskipovaj geedzoj. Ili propagandis la politikon pri naskolimigo, trejnits fakajn laborantojn, faris sisteman servadon al la gravedulinoj dum ilia gravedeco kaj fondis la unuan laboratorion pri eŭgeniko en Yimengmontregiono. Per tio ili celis turnisian atenton de limigo de la naskokvanto al leviĝo de la loĝantara kvalito.

La servostacio origine el 2 ĉambroj jam fariĝis centro pri propagando de naskolimigo, studado de fakaj teknikoj, liverado de preventiloj kaj trejnado de fakaj laborantoj. La naskipovaj virinoj de la 28 distriktoj de la gubernio nomas ĝin sia hejmo kaj rigardas Li Xiuying kiel sian franjon. Ili ŝatas verŝi al ŝi la koron. Li Xiuying diris, ke tio estas la plej bona rekompenco por ŝia laboro. ■

S-ino Li Xiuying en laboro



Kiam J. Rousseau (1712-1778) skribis per ansera plumo sur paperoj sian verkon *KONFESJOJ* en la Okcidento, eble ĝuste tiam en la Oriento Cao Xueqin (ĉ. 1724-ĉ. 1764), kiu kun longa harligo post la kapo sidis en kabano de la Okcidenta Monto apud Pekino, per peniko skribis sian romanon *RUGDOMA SONGŬO*. Jen la du grandaj verkoj, donantaj kolerajn voĉojn kontraŭ la feŭda sistemo, prezentigis antaŭ la publiko.

En la romano Cao Xueqin priskribis pli ol cent virinojn elstarajn kaj kun humanisma sento prikantis la noblecon, saĝecon kaj inteligentecon de tiuj virinoj. Li admiris tiujn kiel objekto-figurojn Vereco, Boneco kaj Beleco, omaĝis siajn kompaton kaj simpation al ili kaj profunde adoris la sinceran amon kaj harmonian rilaton inter viroj kaj virinoj... Sub lia peniko multaj figuroj de junulinoj, belaj kaj saĝaj, precipe Jaspa, Qingwen, Penetra, Ora, Yuanyang, Pacema, Teksa k.a. brilas kaj kortuŝas legantojn. Kvankam J. Rousseau akre kaj profunde kritikis la feŭdan sistemon kaj laŭde reliefigis la heroinojn en sia verko, tamen li prefere ludis la ĉefan melodion pri la individua libereco kun serĉado de Vereco, Boneco kaj Beleco. Kaj Cao pli multe esprimis sian penson de Adorado al Ineco. La heroino de la romano f-ino Jaspa estas ĉarmulino kun ideo de forta memstareco, digno kaj tre zorgas sian amo-serĉadon kaj amo-sincerecon.

Pri la vivo kaj verkado de Cao Xueqin kaj la romano *RUGDOMA SONGŬO* detale kaj klare lekciis en la prefaco de prof. Zhou Ruchang, fama fakulo pri *RUGDOMA SONGŬO*, kaj mi ne babilos plu ĉi tie, karaj legantoj, vi mem foliumu la libron!

Kaj mi preferas pli multe paroli pri la traduko de la romano far s-ano Seimin (Xie Yuming). *RUGDOMA SONGŬO*, kiel la plej granda aŭ "eksterordinara" verko (laŭ prof. Zhou), estis antaŭlonge prezentita al aliaj landoj kaj havis tradukojn japanan, vjetnaman, rusan, germanan, francan, anglan k.a., sed plejparto da tradukoj estis nur el iuj ĉapitroj. La romano havis grandan influon kaj sternis la sorĉon de la ĉina klasika literaturo antaŭ la mondo. Prof. David Hawkes en la Oksforda Universitato angligis la romanon kaj faris laŭdindan meriton en la kultura interfluado, kaj ties traduko estis eldonita en 1973. Dum 1978-1980 la Fremdlingva Eldonejo en Pekino eldonis la trivoluman tradukon en la angla de prof. Yang Xianyi kaj ties edzino Gladys Yang. Tamen en Esperanto neniu peco de tiu verko aperis antaŭ la 90-aj jaroj. Seimin esperantigis la romanon ekde la 80-aj jaroj sub la instigo de s-anoj Zhang Haiping kaj Nan Youli, tiel li, samkiel la aŭtoro Cao, travivis, eĉ hodiaŭ travivas karieron, ke li "poluradis ĝin jardeke, farante aldonon kaj forstrekadon je kvin fojoj" (p. VI) kaj liaj haroj fariĝis grizaj el la nigraj... jen, fine la Esperanta versio, volumo 1 kun la unuaj 40 ĉapitroj prezentigis antaŭ legantoj!

"*RUGDOMA SONGŬO*, entenante profundan filozofian kaj ideologian esperon, abunde kaj aŭtentike spegulas la kulturon" (laŭ prof. Zhou, p. V), do,

SUR NIA LIBROBRETO

POMPO EL LA ĈINA KULTURO

— Pri Esperanta traduko "Rugdoma Songŭo"

de SHI CHENGTAI

temas pri la abunda ĉina tradicia kulturo, ke iu povus demandi, ĉu oni kapablas precize transigi la ĉinan originalon en alian lingvon. Seimin oferis sian strebdon dum jardeko kaj sukcese donis kontentigan respondon. Almenaŭ ni povas diri, ke la esperantiganto faris jenajn:

1. Nia tradukanto fidele esperantigis la tutan originalon sen ajna lasitaĵo. Ni, esperantistoj, bone scias, ke troviĝas granda diferenco inter Esp. kaj la ĉina, tamen nia Seimin jam kapablas fari, ke kvankam laŭ vortoj de ambaŭ lingvoj oni eble ne trovas koincidon unu al alia, tamen laŭ paragrafo li tute (!) transdonas la plenan enhavon de la originala teksto, tio superas la versiojn jam aperintajn en diversaj lingvoj, inkluzive de la angla versio far la geedza paro Yang. Laŭeble li ŝtopis miskomprenan fendon de aliaj tradukoj, kaŭzitan de la lingva kaj kultura obstaklo inter la ĉina kaj alia.

2. *RUGDOMA SONGŬO* ja estas rara trezoro en la ĉina kulturo kaj beletro, "oni ofte ĝin komparas kun enciklopedio, ĉar la aŭtoro tuŝis sciojn kaj sukcesojn preskaŭ de ĉiuj fakoj: vestado, manĝado, loĝado, vojaĝo, kaligrafio, pentrado, metiarto, muziko, ĝardenistiko, festo, celebros, hortikulturo, morbo, medicino, medikamento, katastrofo, funebro..." (p. V). Ĉu la tradukanto kapablas precize doni aŭtentan tradukon pri tiuj fakoj? Ni povas aserti, ke li ja plenumis ĉion tion. Dekoktaĵo por la sango, lieno kaj hepato en la ĉapitro 10 (p. 147) atestas mian aserton. Seimin, la tradukanto, estas mia intima amiko, tial ni havis multajn drinkadojn kaj senbridajn longajn babiladojn. Mi klare scias, ke por precize traduki la tekstojn pri taoismo, li zorgeme tra legis almenaŭ 6 verkojn pri taoismo, inkl. Yi Jin, eĉ trovis kelkajn miskomprenojn en la angla versio...

3. La tradukanto grandgrade, lerte kaj sperte (ĉar



Ilustraĵo de "Ruĝdoma Songŝo"

li iam esperantigis kelkajn elstarajn figurojn en la ĉina literaturo, ekz. Guo Moruo) ekspluatis latentan forton de nia lingvo: li uzis neologismojn, sed nur tiujn en PIV, vivece spegulis la ĉinan kulturan fenomenon kaj sufiĉe esprimis la enhavon pri la socia vivo, kiu inkludas la komplikan influadon de konfuceanismo, budhismo kaj taoismo en la ĉina tradicia

kulturo. Unuvorte, li bone reaperigis la enciklopedian amplekson de la originalo...

Ĉu mi povas ignori tiujn tradukojn de versoj en la romano? Seimin mem estas esperantista poeto, (li mem ofte diris, ke li estas "poeto sen popolo" laŭ Kalocsay), li perfekte surmetis tiujn poemojn aŭ versojn en la romano per la Esperanta poezio! Krome, mi emfazas, ke lia traduko posedas la propran belan stilon.

4. Mi mem verkaĉis kaj tradukis en Esperanto. Laŭ mi, la plej malfacila klopodado por tradukanto aŭ aŭtoro estas manipulado de parola lingvo aŭ dialogo, ĉu ne? En la romano tia, kia *RUĜDOMA SONĜO*, grandioza volumo, vivas centoj da figuroj, troviĝas multaj vivecaj, spritaj dialogoj inter la geherooj. Seimin kapablas per nia artefarita lingvo vigle kaj verve reliefigis tiujn parolojn de la geherooj. Nu, mi recitu el p. 299:

"Vulpineto! Al mi! Aŭ mi rompu vian brakon!"

"Sendanka!" ŝi hihis. "Mi diris nenion al ŝi. Mi venas rekte al vi kun bona intenco, sed vi tiel krudas kontraŭ mi!..."

5. G. Waringhien skribis en sia esearo, volumo 1, ke la Esperanta literaturo ŝajnas muzeo de la monda literaturo. La beletraĵoj en Esp. povas kontribui pli multe ol la nacia traduka literaturo por riĉigi la mondan kulturon. La majesta verko en la ĉina kulturo devas riĉigi la kulturon sur la ter globo per la buntfaceta brilo. La tradukanto faris riĉajn kaj abundajn piednotojn ĉe ĉiu ĉapitro, tio helpas al vi pli facilan kaj kompletan komprenon pri la ĉina kulturo... Ni eble antaŭvidas, ke tiu ĉi volumo posedos grandan meriton en la kultura interkomunikado de la homaro. ■



Antaŭ muziknotoj
Karikaturo de MIAO YINTANG

EKONOMIO

● Fine de 1995 la saldo de ekstera debeto de Ĉinio estis 106.59 miliardoj da usonaj dolaroj, je 13.78 miliardoj da usonaj dolaroj pli multe ol tiu en 1994.

Kalkulate laŭ internaciaj normoj, la procentaĵo de pago de ekstera debeto de Ĉinio estis 7.3% kaj la procentaĵo de ekstera debeto — 69.9% en la lasta jaro, ambaŭ sub la internaciaj avertantaj niveloj.

● Nun 47 alilandaj aviadaj kompanioj servas en internaciaj flughavenoj de Pekino, Ŝanhajo, Tianjin (Tjanĝin), Kantono, Shenyang, Dalian, Harbin, Qingdao (Ĉingdaŭ), Hangzhou (Hangĝoŭ), Xiamen (Ŝjamen), Shenzhen (Ŝengen), Kunming, Hohhot kaj Urumqi. Iliaj aviadiloj flugas al Ĉinio 893-foje ĉiusemajne.

● En 1991-1995 Ĉinio produktis sume 447.2 tunojn da oro. Laŭ plano ĝi produktos 150 tunojn da oro en 2000.

● Lastatempe Hainan-provinco emisiis la unuan transfakan kredit-karton de ĉina banko. Tio markis, ke ĝi ekiras al la “mondo sen monbiletoj”, kie oni aĉetas per kredit-karto.

● 300 000-kilovatta nukle-energia generatoraro estas farita de la Helpmaŝina Fabriko de la Ŝanhaja Elektrejo por Pakistano kaj transportita en tiun landon. Tio montris, ke granda nukle-energia generatoraro de Ĉinio vendiĝas jam en internacia merkato.

● Jam ekfunkciis la Ŝanhaj-Pekina Ekspreso kun “Marko de Agrikulturo, Industrio kaj Komercado de Ŝanhajo” donita post la sukceso en aŭkcio atingita de la Ĝenerala Kompanio de Agrikulturaj, Industriaj kaj Komercaj Grupoj de Ŝanhajo.

La kompanio estas forta en Ĉinio. Ĝi okupis la 76-an lokon inter la 500 fortaj stataj entreprenoj de Ĉinio, proklamitaj de la Ĉina Administracio de Stataj Kapitaloj en la pasinta jaro.

● En Luoyang, Henan-provinco, kreskas peonio, reĝo de floroj. Ĝi vendiĝas en Usono, Kanado, Francio, Nederlando, Japanio, Hongkong kaj aliaj dekoj da landoj kaj regionoj kaj kreskas en multaj lokoj de la mondo.

En Luoyang kreskas 517 specioj da naŭ-koloraj peonioj, kun pli ol du milionoj da peonioj por aprecado kaj komercado. En la urbo estas la unika genobanko por peonioj de Ĉinio, kiu elkulturis 70 novajn speciojn da peonioj.

● En Harbin, Ĉinio, 20-kelkaj aŭtoj portas kun si gasujon por protekti la medion kaj ŝpari energion.

Por atingi la celon necesas aldoni al aŭta motoro premŝanĝilon, fiksi negrandan ŝtalan vazon por rezervi gason en kovrujo kaj pumpi en la vazon 20 kg da gaso. Kun la gasujo la aŭto ŝparigas fuelon je 50% kaj ellasas rimarkindan malmulton da karbona monoksido, hidrokarbido kaj aliaj aeropoluciantaj substancoj.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La unua altfunkcia mikrokomputilo de Ĉinio estis ekspertizita en Ŝanhajo antaŭ nelonge. Ĝi funkcias bone, kiel makrokomputilo, sed multe pli malkara ol la lasta.

● En Ĉinio estas farita nombro da robotoj, kiuj povas fari fotadon, videoregistradon kaj mezuradon de topografio, hidrologio kaj malprofunda stratumo 6 000 m sub la marsurfaco.

Per ili oni povas observi la fundojn de 97% de la profundaj maroj en la mondo. Ili estos uzataj de Ĉinio por ekspluati marajn riĉfontojn en la 21-a jc.

● Blankaj bisporaj fungoj estas plej multe konsumataj en la mondo. La produktokvanto de la blankaj bisporaj fungoj de Fujian (Fuĝjan)-provinco de Ĉinio konsistigas 10% de tiu de la mondo. Freŝaj fungoj estas kolorŝanĝigemaj kaj putremaj, tial kiel teni ilin en freŝeco fariĝis malfacila problemo por la mondo.

Lastatempe la provinco sukcesis en esplorado kaj povas teni la freŝecon de tiaj fungoj por 15-20 tagoj kun dezirata rezulto.

SPORTO

Ĉina uŝu-isto (dekstre) kaj alilandaj turistoj en ekzercado de uŝu-o



- La bokso Umefloro havas longan historion en la ĉina boksarto. Ĝi estas ŝatata precipe de ĉinaj kamparanoj kaj heredata kadre de familio. Pro tio ĝi portas ankaŭ la nomojn bokso Patro kaj Filo kaj bokso Kamparano.

En 1990 fondiĝis la Wuqiang(Ŭĉjang)-a Asocio de Bokso Umefloro en Hebei, Ĉinio. Laŭ difino, ĉiujare okazas prezentado de boksarto kaj estas bonvenaj ekzercantoj el aliaj landoj. Sekve, tie lernas la boksarton multaj amatoroj el Usono, Kanado, Svislando, Francio, Aŭstrio kaj Belgio.

ARKEOLOGIO

- Ĉinaj kaj usonaj sciencistoj malkovris fosilian dentignon ĉe la Flava Rivero en Shanxi(Ŝanŝji)-provinco. Ĝi atestas, ke jam antaŭ 40 milionoj da jaroj vivis prapatroj de simioj kaj homoj sur la Leŭsa Altebenaĵo, almenaŭ kvin milionojn da jaroj pli frue ol tiuj en Afriko.

Laŭ opinio de la monda sciencistaro, la malkovro probable kondukos al paleoantropologia revolucio, ĉar dum longa tempo oni opiniis, ke la homaro originis en Afriko kaj ne en Azio.


- La gravuritaj surskriboj de Baiheliang, grave protektata de Ĉinio pro siaj historiaj restaĵoj, en Yangzi-rivero norde de Fuling, Sichuan-provinco, estas konataj kiel la unika hidrografia stacio bone konservita en la mondo. Tie legeblas 163 surskriboj faritaj en Tang (618-907) kaj aliaj dinastioj. Ili konigas akvomankon en la supra parto de la rivero en la pasintaj 1 200 jaroj.

Nun la Tri-gorĝa Projekto de Yangzi-rivero estas plenumata kaj pro tio nepre necesas laŭeble protekti historiajn restaĵojn ĉe la rivero. Marte de 1996 ĉinaj arkeologoj dekelkfoje per internacie avangardaj ekipaĵoj fotis subakve iujn surskribojn kaj samtempe malkovris gravajn objektojn, ne registritajn en historiaj libroj.

- La ruino Yuanshangdu de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio de Ĉinio revidigas la scenon, ke komercistoj, turistoj kaj misiistoj el Azio kaj Eŭropo aktivadis tie en la 13-a kaj 14-a jc. Grandaj haloj, stratoj, akvoutiligaj instalaĵoj kaj kultejoj sur la ruino estas eltrovitaj kaj pli-malpli prifositaj. La blankmarmora statuo de mongola reĝo estas konata kiel raraĵo.

- Antaŭ nelonge estis eltrovita rizŝelo en la Yuchan-groto de Daoxian-gubernio, Hunan-provinco. Ekspertizite, rizo estis kultivata antaŭ 18 000-22 000 jaroj, plej frue en la mondo. Antaŭ la eltrovo oni opiniis, ke rizo estis kultivata antaŭ 9 000 jaroj.

KULTURO



La kinoteatro kun volba ekrano

- La unua ĉina kinoteatro kun volba ekrano estas konstruita en Pekino. Ĉe la premiero oni projekciis la usonan filmon "Granda Kanjono".

Volboekrana filmoprojekcio estas arto disvolviganta de la lastaj 20 jaroj. La kinoteatro estas ekipita per projekciilo kun fiŝokulaj lensoj, granda volba ekrano kaj stereofonia sonreprodukta sistemo el ok vojoj kaj ses son-kanaloj. Ĝi donas vastegan scenon kaj cirkuligas son-efekton, tiel ke la rigardantoj sentas sin kvazaŭ en la filmo.

- La plej granda ĉina ekspoziciejo de papilioj estas konstruita en Zhongshan, Guangdong-provinco.

En ĝi estas eksponataj pli ol 1 000 specioj da specimenoj de papilioj kaj aliaj raraj insektoj. El la raraj papilioj videblas makaonoj k.a.

SOCIO

- En la lastaj jaroj pli ol 30 kamparanaj familioj en urbeto Liantang, Jiangxi(Ĝjangŝji)-provinco invitis hejmajn advokatojn por solvi konfliktojn inter familioj.

- Nun ĉ. 10 000 familioj de alilandaj entreprenistoj loĝas en Ŝanhajo. Por pliriĉigi la vivon de la alilandaj dommastrinoj la Virina Federacio de Ŝanhajo ekfunkciigis salonon, kio faciligas al ili lerni ĉinan kulturon kaj koni vivkutimojn de ŝanhajanoj.

NESTOJ DE BIRDOJ

SUR la terglobo estas 8 900 specoj de birdoj. Ĉiu birdino demetas unu ĝis kelkdek ovojn. Iuj birdoj kovas ovojn dekelkajn tagojn kaj aliaj eĉ kelkajn monatojn. Ili nestas por garantii la sekurecon dum kovado. Nestado estas granda peniga laboro.

Hirundoj, paseroj kaj pigoj nestas ofte sub alero de homaj loĝejoj aŭ sur arbobranĉoj en ĝardeno. Iu ornitologo faris detalajn notojn: paro da pigoj nestis 4-5 tagojn, dume ili bekprenis materialojn 666 fojojn, el kiuj 253 por velkintaj branĉetoj, 154 por verdaj folioj, 123 por herbaj radikoj, 82 por ŝafa kaj bova lanoj, 54 por kotaj buletoj. Nesto de kardelo pezas nur 53.2 g., sed konsistas el 753 eroj. Apusoj nestas sub alero de turoj, temploj kaj aliaj konstruaĵoj. Ili konstruis, almenaŭ 7 tagojn, sian neston bovlo-forman el malgrandaj gastropodoj de malproksime, argilo, herboj, salivo k.a. Salanganoj kun fortaj salivaj glandoj konstruis sian neston nur el salivo, kiu rapide koaguliĝis kaj sekiĝis en vento. Post prilaborado tiuj diafanaj nestoj grandaj kiel bovleto fariĝis valora tonika manĝaĵo tradicia kaj fama en Ĉinio.

Bucero estas rara en la mondo. Bucera paro nestas en natura kavo sur alta arbo. La virbucero senĉese bekportis argilon, dum la bucerino, sidante en la kavo, vomis el la stomako grandan kvanton da muko kaj miksis ĝin kun argilo por bloki la kavon. Dum la tuta kova periodo la bucerino sin enfermis tie kaj la virbucero nutris



ĝin tra la trueto sur la bloko.

Ambliorniso (*Amblyornis subalaris*) vivas en subtropika pluvarbaro en Aŭstralio. Por allogi ambliornisinon, la virambliorniso nestas sur libera kaj kvieta loko en arbaro, kun freŝa aero kaj sunlumo, abundaj manĝaĵoj kaj akvo. Ĝi faris el branĉetoj 20-30 cm longaj 2 densajn kaj fortikajn barilojn ambaŭflanke de la loko purigita, kies mezo estas trairejo, ĉe kies fino — “dancejo”. Ĝia konstruaĵo similas al eleganta korto. Pli interese estas, ke ĝi kolektis pompajn objektojn, kiaj freŝaj floroj kaj koloraj plumoj, por ornamati sian malgrandan korton. Ornitologo trovis, ke virambliorniso ŝanĝis ĉiutage la velkintajn florojn kaj fruktojn por la freŝaj.

Multaj birdoj bone scias sin defendi. Ili kamuflis sian neston por sekureco. Filoskopoj estas lertaj en tio. Ili plektis el fibroj de branĉoj kaj herbo-tigoj sferan neston en tavolo de sekiĝintaj branĉetoj kaj velkintaj folioj surtere kaj kamuflis la neston per granda kvanto da musko, diversaj branĉetoj kaj folioj, lasante nur malgrandan truon kiel en- kaj elirejon. Megapodiusoj (*Megapodius*) nestas ne por kovado sub la tero en arbaro. Unue ili fosis profundan kavon, amasigis foliojn ene kaj teron sur la folioj — plurfoje unu tavolon da folioj kaj unu tavolon da tero — tiamaniere ili amasigis tombo-forman teraĵon 1.5 m altan kun diametro de 3-4 m. Poste ili faris kavon sur la supro de la teraĵo kiel kovejon. Post metado de ovo en la kavon, ili kovris ilin. La birdidaj elkoviĝis dank’ al la varmo produktita de fermentintaj folioj en la teraĵo.

Podicipoj manĝas, dormas kaj kopulacias en akvo. Ili nestas en kvieta kaj malprofunda lagejo, kie prosperas fragmitoj kaj herboj. Fleksinte herbo-tigojn, la podicipoj plektis ilin kun herboj ĉirkaŭe, metis en la mezon molajn kaj sekajn herbojn kaj defalintajn plumojn. Tiu nesto simila al dika platkuko flosanta sur akvo estas tre komforta por la birdidoj. Alcedoj ŝatas manĝi fiŝojn kaj lertas en nestado. Ili konstruis sian neston sur krutaĵo per sia granda malmola beko. Ili, kiel helikoptero, ŝvebis antaŭ la krutaĵo kaj abrupte sin jetis kontraŭ ĝin por forte beki ĝin. Ili tiel faris foje-refoje. Kiam formiĝis malprofunda kavo, ili eniris por profundigi ĝin per beko kaj samtempe elkavigis la fositan teron per ungoj. La kavo profunda je 0.5 m. fariĝis nesto en formo de sfero. Poste ili faris “pufon” el blankaj fiŝostoj kaj fiŝskvamoj.

Ne nur birdoj lertas en nestado, tamen ilia lerteco estas nekomparebla en la besta mondo. ■



Parto de Haimen

ZHANG QINGZHEN:

LA HIGIENA URBO

HAIMEN

NORDE de Yangzi-rivero kaj proksime de Ŝanhajo situas la urbeto Haimen. Antaŭ kelkaj jaroj ĝi estis malnova urbeto kun monotonaj konstruaĵoj kaj nekompletigitaj instalaĵoj. Sed nun ĝi aperas kun tute nova aspekto.

En 1995 ĝi enviciĝis inter la higienaj urboj de Ĉinio. Ĝia cento da higienaj servoj, kiaj provizado de 76 novaj publikaj necesejoj, fekutiligado kaj enteriga traktado de rubo, atingis la normojn en kontrolo pri la ĝenerala reordigo de higienaj medio de la urboj de Ĉinio.

NOVA ASPEKTO

Aprile de ĉi jaro mi venis al Haimen por fari intervjuon. Mi vidis, ke la 16 ĉefaj stratoj estas larĝaj kaj puraj kaj ambaŭflanke de ĉiu strato staras diversaj etaĝdomoj, magazenoj kaj aliaj publikaj instalaĵoj. Mia akompanan-

to diris, ke antaŭe tie estis multaj kabanoj.

Mi informiĝis, ke verdigado, purigado kaj beligado iras samtempe kun rekonstruado de la malnova urbo. 40-procenta amplekso de verdec, dekorado per 200 000 vazoj da freŝaj floroj kaj rekonstruado de parkoj kaj promenejoj faris la urbon aerofreŝa kaj ĉarma. La magistrato investis 6 milionojn da juanoj por verdigi 157 hektarojn.

La loĝantoj de la malnova Haimen scias, ke antaŭe en la tieaj riveroj kaj kanaloj fluis malpura akvo. Post reordigado ili fariĝis puraj kaj senflosaj, kaj en ili naĝis fiŝoj. Nun specialaj laborantoj respondecas pri pureco de tiuj riveroj kaj kanaloj.

En la ĉefaj stratoj estas starigitaj signotabuloj por malpermesi aŭtokornadon. La Medi-protekta Buroo de Haimen establis 146 monitorejojn por mezuri atmosferan kvaliton kaj bru-intensecon.

SINTEZA TRAKTADO DE RUBO

Lokanoj diris, ke ĉie en la malnova Haimen videblis rubo. Nun rubujoj tegitaj per kaheloj dislokiĝas en stratoj, kaj ambaŭflanke de la ĉefaj stratoj — diversaj tenujoj por fruktaj ŝeloj.

Kiel trakti ĉiutage 50 tunojn da rubo kaj 20 tunojn da feko en la urbo? Por tion scii mi veturis al traktejo de rubo kaj feko apud Yangzi-rivero. La traktado, kiun projektis la Instituto de Parazita Preventado kaj Kuracado de Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco kaj Ĉina Metano-Asocio, estas avangarda en Ĉinio. La ĉefa maniero estas enterigi rubon kaj sinteze trakti malpuran akvon el la rubo. La traktita malpura akvo estas senkolora kaj sengusta kaj fiŝetoj libere naĝas en la cisterno.

“FLAVA TABULO” SUR LA PORDO DE VENDEJO

Mi rimarkis, ke sur la pordo de ĉiu organizaĵo okulfrapas tabulo ruĝa, ruĝeta aŭ flava. La ruĝa

signifas organizaĵon bonegan, la ruĝeta bonan kaj la flava kompare malbonan. Mi trovis, ke antaŭ manĝaj-vendejo kun flava tabulo iu kliento, kiu volis eniri por aĉeti, retiriĝis dirante, ke estas prefere aĉeti en vendejo kun ruĝa tabulo. La deĵoranta vendistino diris, ke kun la tabulo ili malfacile komercas kaj ili devas penadi por pli frue gajni la ruĝan. Mi demandis, kial ili ricevis la flavan tabulon. Ŝi respondis, ke laŭ regulo la vendistoj devas porti uniformajn vestojn, sed fakte ili ne faris tion, kaj plie, ili havis etajn mankojn. Laŭdire, el la 46 organizaĵoj, kiuj ricevis flavan tabulon en la unuafoja kontrolo, restis nur 5 en la duafoja.

PURIGI TRINKAKVON

Iu kadro de la Kranakvo-proviza Kompanio de Haimen diris al mi, ke nun multe da trinkakvo enhavas mineralon utilan por la sano. Lastjare la magistrato investis 40 milionojn da juanoj por fosi 9 profundajn putojn, interalie, 4 je 350 metroj profundajn. Ĉiutage proviziĝis pli ol dekmilo da tunoj da kranakvo.

Komputiloj de la akvoproviza fabriko montris, ke la klareco de la akvo, bakteria sumo, oksigena enteno ktp konformas al la normoj starigitaj de la ŝtato.

Laborantoj ofte purigis kaj malinfektas akvocisternon sur la tegmento de loĝdomo. La Kranakvo-proviza Kompanio ne nur kovris pli ol milon da akvocisterno, sed ankaŭ fondis specialan taĉmenton por administrado.

Vespere, kiam mi promenis sur strato, mi vidis diversajn lampojn; la neonlampoj kun la vortoj “Spirito de Haimen” estis alkroĉitaj al gravaj konstruaĵoj; kaj koloraj lampoj faris diversajn konstruaĵojn pli graciaj.

La bela medio allogas multajn ĉinajn kaj alilandajn turistojn kaj entreprenistojn. Itala specialisto de media protekto diris: “La medio estas bona kaj mi investos por fari verdaĵan kulturadon en Haimen.” ■

GALERIO

Aglo sur cipreso

de YING ZI

La pentraĵo “Aglo sur cipreso”, 147.3 cm alta kaj 96.8 cm larĝa, estis farita de Zhang Shunzi kaj Xue Jieweng de Yuan-dinastio (1206-1368). La cipreso estis pentrita de Zhang, dum la aglo de Xue.


Zhang Shunzi naskiĝis en la urbo Hangzhou. Li estis lerta en literaturo, kaligrafio kaj pentrado de arboj, bambuoj, rokoj kaj pejzaĝoj. Li lernis fortajojn de antaŭaj pentristoj kaj formis siajn proprajn trajtojn. Liaj pentraĵoj elspiras kaj antikvecon kaj freŝecon, ĉu ili estas koloraj, ĉu nigra-blankaj. En tiu ĉi pentraĵo la cipreso estas el fortaj strekoj, kiuj estas tamen dece limigitaj. Ĝi neniom paligas la rabobirdon.

Oni ne bone konas pentriston Xue Jieweng. Tamen la aglo, kiun li faris en tiu ĉi pentraĵo, profunde impresas la rigardantojn. La rabobirdo estas prezentata en preciza korpa proporcio kun viva kaj elvokiva aspekto. Bildigo de ĝiaj detaloj estas viveca. Ĝuste pro tio la aglo, kvankam ne estas tre granda, tamen okulfrapa.

La sukcesa kunlaboro de la du pentristoj faris la pentraĵon tre grava en la ĉina belarta historio.

鷹
白
雲
中
隱
居
之
意
也
一
六
八
年
冬
月
畫
於
此





Pagodo ĉe lago

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九六年第八期

(本刊代号:二—九—五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2

